

1981 septembro

74-a jaro



n-ro 909(9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Brazilio fariĝas lumturo kaj inspiro

Vi trovos,

ke la "hejma tasko" finfine estas preta. Ni per tiu lerneja esprimo volas aludi la kompleksecon de la tasko redakti la kongresan revunumeron. Oni ĉi tie ne rajtas multe improvizi, plenigi la spacon per hazarde disponeblaj tekstoj aŭ fotoj. Ĉiujare la Kongreso estas hejma tasko, kiun la redakcio solvas kontentige aŭ malbone. Nu, ni provis bildigi la tutan festenon de la Internacia Lingvo, okazintan fine de julio — unuafoje en Sud-Ameriko, unuafoje en la suda hemisfero, unuafoje en evolulando, unuafoje kun vere universala partopreno. Pro tiu nia provo, la rubriko "Kelklinie pri. . ." fariĝis "kelkpaĝe pri. . .", kaj ni ankoraŭ ne sukcesis mencii ĉion. Vi rimarkos, ke ankaŭ en ĉi tiu numero aperas pluraj tekstoj sen indiko de la aŭtoro. Nun, kiel ĉiam, atribuu tiajn artikolojn al la redaktoro, precipe se ili enhavas iom da oblikvaj pensoj, iom da kritikemo, akra foje sed bonintenca ĉiam. Ah, tiuj homoj en Brazilo! Nun la printempo frapas ĉe iliaj fenestroj, dum ni ĉi tie en la nordo foradiaŭas la someron. Vi scias, ni estis tie dum la vintro, tiel nomata. Kia ŝerco de vintro! Sed, mankas la spaco por rakonti al vi tion. Saluton al ambaŭ hemisferoj!

Enhavo

- 141 66a Universala Kongreso de Esperanto: Definitiva malkovro de Sud-Ameriko (S. Milojević)
- 142 Solena Inaŭguro: Longe, dulingve, sed impone
- 143 El la salutvortoj de d-ro Aureliano Chaves, vicprezidento de Brazilo
- 144 Bonveniga parolado de senatano José Lins Albuquerque, prezidanto de Loka Kongresa Komitato
- 145 Inaŭgura parolado: Ni brazu niajn kulturojn, ni ne kunfandu ilin! (William Auld)
- 146 Ĝenerala Direktoro de Unesko al la 66a Universala Kongreso de Esperanto: Proksimeco de la interesoj
- 147 Malferma solenaĵo: Malekvilibro tagorda (S.M.)
- 148 El la malferma parolado de la prezidanto de UEA: Esperanto estas nia libereco (Grégoire Maertens)
- 149 Kunsidoj de la Komitato: Komitato kun kvorumo Kongresa Rezolucio
- 150 Kunsidoj de la Estraro: Estraro en Bona Espero
- 151 Internacia Kongresa Universitato: Maksimume freŝa kaj nova
- 152 Esperantologia Konferenco: Pri lingvo, movado, literaturo (H. Tonkin) Rezolucio pri handikapuloj
- 153 Ĝeneralaj Kunsidoj: Vigle pri jarraporto; Pontoj kaj baroj al la kongresa temo; Solena Fermo: Ĝis Antverpeno!
- 154 Belartaj Konkursoj de UEA 1981: Tri premioj al Mauro Nervi Internacia Arta Vespero: Talentoj serĉas reĝisoron (Diccon Masterman)
- 155 Belartaj Konkursoj 1981: Originala poezio: Unua premio: La nokto (Mauro Nervi)
- 156 Aliaj artaj programoj: Gitaro rolas orkestron (S.M.) Kelklinie pri. . . (informoj pri aliaj partoj kaj aspektoj de la Kongreso)
- 158 37a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Ĉu TEJO ekzistas ekster Eŭropo? (Robert Haddon)
- 159 Plia paŝo al tutmonda TEJO (Amri Wandel)
- 160 Kongreseroj. . . (iom da gajaj kaj iom da malgajaj kongresaj notoj)

La kovrilo

Jen ĝi denove, kvankam unuafoje ĝuste sur nia kovrilo, la skulptaĵo-konstruaĵo de la Federacia Parlamento de Brazilo. Tiu impona arkitektura verko restos por multaj kongresanoj la ĉefa bildo kunportita el la futurisma ĉefurbo de la kongresa lando. Supozeble longe, tre longe, ni memoros la ĝemelajn blankajn kolosojn kaj la duonsferan salonegon maldekstre (tie okazis la Inaŭguro) kiel la plej belan ejon, kiu ĝis nun servis al niaj Kongresoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nw Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo; tel. (061) 22 68 01.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387-8288.

Definitiva malkovro de Sud-Ameriko

BRAZILIO, la plej moderna grandurbo de la mondo, gastigis inter la 25a de julio kaj la 1-a de aŭgusto ĉi-jare la 66an Universalan Kongreson de Esperanto. Ĝi estis ne nur la unua Universala Kongreso okazinta en la suda hemisfero de la terglobo sed ankaŭ la plej granda ekstereŭropa UK. Kun siaj 1 749 aliĝintoj el 49 landoj, ĝi superis la Kongreson de Tokio en 1965 je kelkaj dekoj, kaj tiun de Portlando en 1972 je preskaŭ duoblo da kongresanoj. Krome, ĝi estas la tria plej granda Universala Kongreso dum la lastaj dek jaroj.

Multaj aspektoj de la 66a UK estas tiel novaj kaj unikaj, ke ili impresas preskaŭ ŝoke. Rigardu, ekzemple, la statistikon pri la kongresanoj, laŭ la kontinentoj ĉi-foje: Afriko 6, Aŭstralio 14, Azio 60, Eŭropo 504, Nord-Ameriko 77, Sud-Ameriko 1 088. Ĉu tiu lasta nombro de la sud-amerikaj aliĝintoj ne reprezentas pli da homoj el tiu kontinento, ol kolektis ĉiuj antaŭaj Universalaj Kongresoj kune? Ĉu vi rimarkis, ke Eŭropo ĉi-foje ne sukcesis liveri eĉ trionon de la kongresanoj, kiuj en Brazilio sin sentis, fine kaj prave, kiel minoritato?

De kie venis tiuj 1 088 sud-amerikanoj? Brazilo mem liveris 932 aliĝintojn, kio estas pli ol duono de ĉiuj kongresanoj. El Argentino partoprenis 113 homoj, dum Ĉilion reprezentis 6, Kolombion 9, Peruon 12, Urugvajon 4, kaj Venezuelon 12 aliĝintoj. La 66a UK tiel certe fariĝis la plej granda renkontiĝo de la sud-

Foto: S. MacGill



Du eminentaj rolantoj en la 66a UK, kiu donas novajn dimensiojn al la tutmondeco de Esperanto: José Lins Albuquerque (maldekstre), prezidanto de LKK, kaj d-ro Aureliano Chaves, vicprezidento de Brazilo.

amerikaj esperantistoj kaj, supozeble, ankaŭ brazilanoj mem neniam antaŭe sukcesis ariĝi tiel amase.

Kiam ni antaŭ kelkaj jaroj raportis pri la Kongreso en Rejkjaviko (1977), ni nomis ĝin "la norda ekspedicio". Kiel do nun sukcesis "la suda ekspedicio"? Se ni post la pasintjara UK laŭte asertis, ke "Stokholmo tamen estis alia", ĉu nun Brazilio almenaŭ similis al tradicia Universala Kongreso?

Ne, ĝi ne similis. Neniu el tiuj niaj kutimaj mezurunuoj, helpe de kiuj ni komparas la Universalajn Kongresojn, funkcias en la kazo de la 66a UK en Brazilio. Niaj metroj montriĝas neadekvataj, ĉar Brazilio trudas sin kiel la plej universala el la Universalaj Kongresoj. La sukceso de la "suda ekspedicio" estas eksterproportie granda. Oni povas nur konfuzi miri serĉante respondojn al la demando, kial la Esperanto-movado bezonis 75 jarojn da Universalaj Kongresoj antaŭ ol iri al Sud-Ameriko. Nun, preskaŭ 483 jarojn post Kristoforo Kolumbo, ankaŭ ni malkovris finfine kaj definitive la "verdajn kontinentojn", kiel oni ofte nomas Sud-Amerikon.

Kial ni ĉi-antaŭe asertis, ke la 66a UK ne similis al la kutimaj Universalaj Kongresoj? Nu, unuavice temas pri la homoj mem, pri la kongresanoj el kiuj du trionoj neniam antaŭe spertis la plej grandan Esperanto-renkontiĝon. La Kongreso do estis konsiste tute nova, kaj eĉ konataj movadaj figuroj povis senĝene promeni inter la kongresanoj, sen ke amaso da konatoj kaj scivoluloj tiru iliajn manikojn, petu aŭtografojn k.s. Due, la latitudoj de la kongresa lando provizis nin per novaj geografia kaj klimata spertoj. Trie, la kongresa urbo en sia tuteco proponis ekskurson en la mondon de morgaŭ. Kvare, Brazilo montriĝis ekstreme malavara gastiganto (senpaga kongresejo, centoj da senpagaj litoj, malavara subvencio, senkosta produkto de kongresaj eldonaĵoj ktp.), tiel ke eĉ la kongresanoj, kiuj pene akiris la brazilan vizon, sukcesis pardoni al la lando la kafkecan burokratismon en kelkaj ĝiaj konsulejoj. Kvine, — kaj nur ĝis tie ni iros — la homoj, kiuj ĉefrolis en la 66a UK, ne estas la kutimaj kongresaj rolantoj. Jen kelkaj nomoj de la brazilaj ĉefagantoj: Enivaldo, Cunha, Ursula, Francisco, Neima, Néia, Nogueira, Knoedt, Francini, Solís, Giuseppe, Gersi, Mosonyi, Paulo Vieira, Barrocas, Mabesoone, Chaves, Amarílio, Ciro, Mättig, André Luiz Fausto, Joel, Roberto kaj deko da aliaj. Valoris iri al Brazilio eĉ se nur por konatiĝi kun tiuj homoj kaj iliaj talentoj.

Vi vidos en la sekvantaj paĝoj, ke knaris multo en Brazilio organize, preskaŭ ĉiuj programeroj malfrue komenciĝis kaj ofte longiĝis preter ĉiujn planojn. "Ne gravas. Ĉio tamen okazis", asertis sud-amerikano al ni. Kaj, pravas tiu brazilano! Liavorte, ni ne estis tie en

fabriko, kie iu pagus ĉiun nian minuton, ni estis en unika internacia kunveno, kie la eksterprogramaj homaj kontaktoj gravis pli ol la tuta kongresa programo. Kial la eŭropanoj ĉiam atendas, ke la aliaj lernu de ili? Ili mem povus mallerni multajn aferojn, precipe en la kampoj kie evidentas, ke ili lernis tro.

Kvankam la 66a UK en Brazilio estas ankoraŭ tro proksima kaj tro freŝa en la memoro, ĝi komencas al

ni lumi kiel unu el la movade plej imponaj Universalaj Kongresoj. Ĝi fariĝas lumturo kaj inspiro, ĉar ĝi en pluraj jardekoj estas la plej signifa kontribuo al la universaleco de la Esperanto-movado. Se ni pro aliaj kialoj, laŭ neskribitaj reguloj, dum ĉiu jardeko "ŝuldas" okazigon de Universala Kongreso en la Orienta Eŭropo, ni devus senti niajn tiurilatajn ŝuldojn ankaŭ al Sud-Ameriko.

sm

SOLENA INAŬGURO:

Longe, dulingve, sed impone

LA SOLENA INAŬGURO de la 66a UK komenciĝis jam ekster la salono, kiam super la vasta herbejo antaŭ la Federacia Parlamento aperis tri paraŝutistoj kun Esperanto-flago, kiun ili transdonis al la prezidanto de UEA Grégoire Maertens. Tiu "solena aŭguro" estis aparte spektakla nutraĵo por tiuj centoj da movadaj lumbildistoj, kiuj akompanas ĉiujn niajn kongresojn. Ankaŭ la Parlamentejo, ekstere kaj interne, impresas kiel grandioza moderna skulptaĵo, kiel cetere prezentigas la tuta brazila ĉefurbo.

Ĉu la 66a UK estas la unua el niaj kongresoj, kies Solena Inaŭguro okazis en la parlamentejo de la gastiganta lando? Ĉiukaze, estas malfacile memori pli imponan kaj pli belan inaŭguran salonegon, ol tiu en Brazilio. La granda kongresa Flago neniam antaŭe tiel majeste proponis sin al la okulo en plena kolorharmonio: nigra vitra fono kun densaj vertikalaj strioj el metalo, tie kaj jene lititaj per flavaj kaj verdaj kvaranguloj. Ĉu aliaj kongresanoj rimarkis la speguliĝon de la Flago en la nigra vitro ambaŭflanke de la ronda salono? Sur la podio, antaŭ kiu ravas du grandaj floraranĝoj de speco kiun nur tropika lando povas proponi, centre, en iom imperiestra brakseĝo, sidiĝas Lia Moŝto d-ro Aureliano Chaves, Vicprezidento de Brazilo, reprezentanto de la Alta Protektanto — João Baptista de Oliveira Figueiredo, Prezidento de Brazilo. Apud la vicprezidento sidiĝas: la prezidanto de UEA Grégoire Maertens, senatano José Lins Albuquerque (prezidanto de LKK), d-ro Freitas Nobre (prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj, kie okazis la Inaŭguro), prof. d-ro Paulo Vieira da Silva (rektoro de Internacia Kongresa Universitato), mag. William Auld (prezidanto de la Akademio de Esperanto) kaj d-ro Victor Sadler (ĝenerala direktoro de UEA). En la dua vico sur la podio sidas la estraranoj de UEA, d-ro Braz Cosenza kaj prof. Sylla Chaves, prezidantoj de la brazilaj landaj asocioj de UEA.

Nekutime por la Universalaj Kongresoj, ŝajne iom tipe por Brazilo, la Inaŭguro komenciĝas per la nacia himno, kiun ludas pompe uniformita orkestro supre sur la balkono. Ankaŭ laŭ brazilaj kutimoj, la Vicprezidento de la Respubliko prezidas la Inaŭguron, portugallingve, kun kompetenta sinsekva traduko de

d-ro Walter Francini. S-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA, prezentas la podianojn kaj faras mallongan salutparoladon, kiun Francini tradukas en la portugalan. Maertens finas sian paroladon per jena frazo: "Ĉar por mi estas la unua fojo, ke mi malfermas Kongreson kiel prezidanto de UEA, mi kun treega, ĝisfunda emocio deklaras malferma la 66an Universalan Kongreson de Esperanto."

Parolas senatano José Lins Albuquerque, kiu en la Inaŭguro reprezentas ankaŭ d-ron Jarbas Passarinho, prezidanton de la Senato. En tiu longa parolado (vidu parton de ĝi sur la paĝo 144), la prezidanto de LKK forte emfazas la fakton, ke la 66a UK estas la unua monda Esperanto-kongreso en evolulando kaj substrekas la rolon, kiun tiaj landoj povas ludi por Esperanto. Sekvas, kiel ia ornamaĵo de la inaŭgura programo, la oficiala lanĉo de la speciala poŝtmarko, kiun la brazila poŝto eldonis por omaĝi la Kongreson.

La parolon tiam prenas la Vicprezidento de Brazilo d-ro Aureliano Chaves, kies tondra voĉo kaj kuraĝigaj vortoj provokas plurajn entuziasmajn aplaŭdojn. Tiu parolado (kiun poste okcidenteŭropa ambasado en raporto al sia ministerio nomos "neatendite politika") estis unu el la plej belaj elpaŝoj de kongreslanda dignulo en niaj Kongresoj. Granda parto de tiu klara kaj aŭdaca saluto aperas ĉi-apude en aparta kadro.

Post muzika intermezo (klarneta duo, kiu ludis mezepokan pecon kaj komponaĵon de Mozart), d-ro Aureliano Chaves forlasas la salonon akompanata de entuziasma stara aklamo de la kongresanoj. La Vicprezidento de Brazilo restis ankoraŭ mallonge ekstere en la vestiblo, por fari plian servon al Esperanto donante intervjuon al la nacia televido.

D-ro Humphrey Tonkin voĉlegas la mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de Unesko (vidu aliloke en ĉi tiu numero) kaj anoncas tiun kutiman bukedon da diplomatoj, kiujn prezentas d-ro V. Sadler. Nome de Argentino parolas (en Esperanto) s-ro Ricardo Ramayón, komerca ataŝeo, dum por Aŭstralio ĉeestas la ambasadoro, s-ro Rudolf Schnaarmann, kaj por Aŭstrio parolas la unua sekretario, s-ro Christian Lassmann. La aferŝarĝito de la ambasado de Belgio, s-ro Veranneman, memorigas nin, ke Brazilio estas



konstruita kiel "la ĉefurbo de la espero" kaj pro tio aparte konvenas por kongreso de "la lingvo de la espero". Li emfazas la senton de aparta honoro, pro la elekto de Antverpeno kiel gastigonto de la 67a Universala Kongreso. Kvazaŭ por emfazi sian komprenon de la lingvaj problemoj, la belga diplomato unue parolas france, poste flandre, por fini en Esperanto per "Ĝis revido en Antverpeno!". La ambasada konsilanto de Ĉinio, s-ro Cheng The-ho, aparte emfazas la grandan subtenon, kiun la brazila ŝtato donis al la Kongreso, kaj atentigas, ke li dividas la dezirojn de la esperantistaro rilate la bezonon de komuna internacia lingvo.

S-ro Finn Theilgaard, unua sekretario kaj aferŝarĝito, salutas nome de la ministro pri kulturo de Danlando,

dum nome de Finnlando parolas s-ro Esko Kautto, aferŝarĝito. Francio estas reprezentita pere de funkciuloj de sia Kultura Servo en Brazilo, kaj nome de Hungario ĉeestas d-ro Józef Németh, unua sekretario. Por Italio parolas d-ro Salvatore Amadeo Ragona, kultura ataŝeo, kiu memorigas la ekziston de itala parlamenta grupo "Amikoj de Esperanto".

Sekvas la saluto de s-ro Nobuo Oguchi, ambasadoro de Japanio, kiu konfesas, ke li "preskaŭ ĉiutage sentas kiel forta estas la lingva baro" kaj diras: "Se ni povus havi unu komunan lingvon, tio ne nur plifortigus la reciprokan interkompreniĝon de diversaj popoloj, sed ankaŭ forigus la rasajn antaŭjuĝojn kaj helpus krei harmonion kaj pacon inter la homoj." Nome de Jugoslavio ĉeestas s-ro Radoje Tatić, ambasada konsilanto,

Aureliano Chaves, vicprezidento de la Federacia Respubliko Brazilo:

"Unue, mi bedaŭras, ke mi ne parolas al la gekongresanoj per la lingvo konvena al tiu ĉi Kongreso — Esperanto . . . Tamen, tio ne malgrandigas la entuziasmon, kiun mi sentas por lingvo, kiu — prezentante sin politike sen armiloj kaj ekonomie sen postuloj — okupos, pli aŭ malpli frue, sian pozicion kiel universala lingvo.

. . . En kongreso kia estas ĉi tiu, ne estas superflue memorigi, ke la lingvo prezentigas samtempe kiel elemento aglutina de la socio kaj kiel elemento disiga inter la nacioj. Ekde la biblia epizodo pri Babelo la homoj klopodas eltrovi instrumenton por internacia interkompreniĝo, lingvon, kiu, servante al ĉiuj, perme-

sos, ke ĉiuj pli bone interkompreniĝu. La historio de la homaro atestas, ke tra la epokoj diversaj lingvoj superregis la aliajn. . .

Sed, post la Dua Mondmilito, pro la forta influo de la angle parolantaj landoj, precipe Usono, la angla fariĝis vaste uzata lingvo. Oni parolas la hispanan en 22 landoj, kaj la portugalan en ses landoj. Sed ĉiuj ĉi lingvoj portas kun si la aspekton de altrudo, ĉu kultura, ĉu ekonomia, ĉu militista. Neniu el tiuj lingvoj portas la aspekton de neŭtraleco kaj senarmeco, kiel faras Esperanto. Ĝi ne trudas sin kaj ĝi ne estas fremda, kiel prave diris la senatano José Lins. Ĝi ne invadas nian individuecon, ĝi ne trarompas la pordojn de nia komunumo perforte. Ĝi eniras niajn komunumojn, ĉar ni deziras, ke tio okazu, ĉar ni malfermas la pordojn al ĝi."

dum por Meksikio parolas s-ro José Borjon, konsilanto, kaj por Nederlando d-ro Philip de Waal, kiu atentigas pri la honoro de lia lando servi kiel sidejo de UEA. S-ino Liv A. Kerr, aferŝarĝito de la ambasado de Norvegio, salutas nome de sialanda ambasadoro. Tute apartan atenton ricevas s-ro Jan Kinast, ambasadoro de Pollando, kiu en longa Esperanta parolado atentigas pri la multnombro de la kongresanoj el Pollando, kiu kun 51 aliĝintoj estis la kvina plej amase reprezentita lando en Brazilio.

En la Inaŭguro Portugalion reprezentis la ambasada aferŝarĝito, s-ro Teixeira da Mota, kaj nome de Svedio parolis s-ro Jacob Ankarcrona, aferŝarĝito, kiu asertis, ke la intereso pri Esperanto en Svedio kreskis post la pasintjara Kongreso en Stokholmo. La unua sekretario de la ambasado de Svislando, s-ro Jean-Jacques Maeder, estis la lasta diplomato, kiu salutis la Inaŭguron. Kvankam skribe anoncita, ne okazis la reprezentiĝo de Dominika Respubliko, FR Germanio, Maroko kaj Pakistano.

La Solenan Inaŭguron ĉeestis ankaŭ reprezentanto de Organizo de Amerikaj Ŝtatoj. Du gvidaj politikistoj de Nov-Zelando, s-roj R.D. Muldoon (ĉefministro) kaj W.E. Rowling (estro de la opozicio), sendis al la Kongreso skribajn bondezirojn.

La kongrestema parolado de mag. William Auld (kompleta teksto aperas ĉi-numere) estis eleganta fino



Antipoda saluto: Parolas la ĉina diplomato (dekstre)

de la longa, pli ol 3-hora, inaŭgura solenaĵo. Estis la interpretado, kiu longigis ĝin. Restas ankaŭ la demando, ĝis kiu grado la Universalaj Kongresoj, kiel unu el la plej grandaj kaj plej longtradiciaj internaciaj kunvenoj, devas rezigni pri siaj kutimaj tagordo kaj proceduro kaj sekvi oficialan ceremonipreskribon de la gastiganta lando. Tamen, lokita en perfekte konvena ejo, ŝarĝita per amaso da kuraĝigaj alparoloj de brazilaj kaj alilandaj eminentuloj, la Solena Inaŭguro de la 66a UK estis bela kaj impona travivaĵo.

José Lins Albuquerque, senatano, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato:

”Eksterordinare grava estas la okazigo de ĉi tiu Universal Kongreso en Brazilio. Emociiĝintaj, ni konscias, ke ĉi tiu majesta festo havas apartan signifon por la brazilanoj kaj ke ĝi inaŭguras novan stadion en la historio de la Esperanto-movado. Ni estas samtempe honoritaj kaj fieraj: honoritaj pro la akcepto de tiom da gastoj, kiuj venis el pli ol 50 landoj; fieraj — ĉar iasence ni pioniras. Ni pioniras pro tio, ke UK unuafoje realiĝas en la suda hemisfero. Ĉi tio estas geografia kuriozaĵo, kiun ni ne povas neglekti, sed ĝi en si mem prezentas neniun homan aŭ socian implikon. Multe pli elstara estas la fakto, ke unuafoje lando apartenanta al la t.n. Tria Mondo, tipa evolulando kia estas Brazilo, bonvenigas esperantistojn el ĉiuj partoj de la terglobo. . . . De nun Universalaj Kongresoj ne plu ligiĝos al la evoluintaj landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko. De nun la sektoroj de nia Movado, situantaj en Latin-Ameriko, pli bone povos intensigi sian kunlaboradon kaj kulturan interŝanĝon kun la ceteraj landoj. Tiun atingon ni ŝuldas al la klarvida politiko de UEA en la lastaj jaroj, kiu kondukis la Asocion al la agado sur plej diversaj kampoj kaj en la plej diversaj mondo-partoj. Tiamaniere nia Movado unuiĝas tra la tuta mondo, libera de ideologiaj kaj sociaj baroj, kiujn oni antaŭe konsideris nesupereblaj.

Mi opinias, ke estas absolute necese atentigi pri la kontribuo, kiun la evolulandoj povas fari al Esperanto.

Por ili la kultura izoliĝo aŭ la unuflanka kultura dependeco de unu aŭ alia grandpotenco fariĝas ĉiam pli netolerebla pro la bezonoj de la akcelado de la evolu-procezoj en ĉiuj vivosferoj.

Ni deziras komuniki kun ĉiuj landoj kaj havi aliron al ĉiuj kulturaj fontoj, sendiskriminacie, por ke ĉiu el ni, en nia tuta diverseco, donu obolon al la disvolviĝo de niaj naciaj fortoj kaj riĉaĵoj. Eble estas pro tio, ke la plej rimarkindaj sukcesoj de la Esperanto-movado en la lasta jardeko okazis ĝuste en evolulandoj.

Brazilo estas klasifata inter tiuj landoj al kiuj ne mankas kuraĝo kaj persisto por krei ion novan. Konsideru la ekzemplon de Brazilio. La konstruado de tia ĉefurbo, meze de izolita kaj seka altebenaĵo, estas faro senprecedenca, kiun eble nur evolulando — avida je progreso — povas kuraĝi realigi. Brazilio tamen estas kreita, ne kiel io limigita kaj vulgara, sed kiel valora arkitektura verko, kiu impresas kaj ĉarmas. Brazilio nun estas la simbolo de nia nacia animo, kiun ni proponas al la mondo, kiel lokon de frateca universala renkontiĝo.

Verdire, la evolulandoj pli ol la aliaj landoj ne timas la novecon, ĉar ili mem estas novaj kaj ŝanĝiĝantaj. Pro tio ankaŭ la ideo pri internacia lingvo estas novaĵo, kiun ili facile akceptas kaj povas plene disvastigi. En tiu senco mi kredas, ke ĉi tiu Universal Kongreso reprezentas la agnoskon de la graveco de Brazilo, de Latin-Ameriko kaj ĝenerale de la evolulandoj por la estonteco de Esperanto kaj ĝia movado.”

Ni brazu niajn kulturojn, ni ne kunfandu ilin!

KULTUROJ kaj lingvoj: pontoj kaj baroj; jen la ĉef-temo de nia 66a UK. Oni parolas multe pri kulturo kaj kulturoj, kvazaŭ la termino estus memkomprenebla. Tamen se oni klopodas ĝin difini, oni renkontas tuj seriozajn malfacilaĵojn. Efektive, unu kritikisto diris jenon:

”**Kulturo** estas unu el la vortoj, kiuj ekzemplas la leĝon de pligrandiĝanta malprecizo. Ĝi estas koncepto, kiu kreskas per memkonsumado, ĝis fine ĝi ampleksas tiom multe, ke ĝi difinas efektive nenion.”

Kvankam trafa, tio tamen malmulte helpas, ĉar almenaŭ la koncepto **kulturo** estas realaĵo en la plimultaj homaj mensoj. Post multjara studado de la fenomeno, mi estas preta proponi al vi mian propran difinon:

Kulturo estas la sumo de la karakterizoj, kiuj diferencigas unu homgrupon de la ceteraj.

Ĉiu kulturo estas laŭdifine ekskluziva; ĝi enhavas fortan senton de ”ni” en komparo kun ”ili”, t.e. ĉiuj nemembroj de la koncerna grupo. Kaj tamen ĉiu homo malsimpla, aŭ kiel oni diras: ”kulturita”, apartenas samtempe, se ne samgrade, al pluraj ”kulturoj”. Kvankam supraĵaj pensantoj plej ofte agas kvazaŭ ekzistus nur kulturoj **naciaj**, tio tamen estas eraro. Oni povas pensi pri kulturoj pli larĝaj ol la nacioj, ekz-e kulturo kristana aŭ islama; kaj ĉiu nacio mem konsistas el multaj apartaj aŭ interplektiĝantaj kulturgrupoj, ekz-e nigruloj apud blankuloj, aŭ romkatolikoj apud protestantoj, aŭ terkulturistoj apud laborantoj en grandurba industrio, ktp. Verŝajne ekzistas en la plimultaj homoj ia psiĥa neceso senti sin membro de grupo. Sed



Per la inaŭgura parolado pri la kongresa temo komenciĝis okupoplana semajno de William Auld en Brazilio.

membreco povas diversiĝi laŭ la cirkonstancoj. Homo, kiu dum tempo de internacia krizo forte sentas nacian solidarecon, povas tute bone dum tempo de enlanda krizo senti sin eĉ malamiko de iuj samnacionoj, apud kiuj li staris ŝultr-al-ŝultre dum la internacia krizo.

Jes, sed ĉu tio indikas diferencon kulturan inter la grupoj? Kompreneble mi ne scias tute certe, sed ŝajnas al mi, ke tre ofte probable jes. Ŝajnas al mi, ke al kulturaj diferencoj povas kontribui tre multaj faktoroj, kiel ekz-e (ni jam vidis): nacio, klaso, religio, ktp. Sed tute certe, laŭ mi, la plej grava distinga faktoro inter kulturaj grupoj estas diverseco lingva. Eĉ tiam, kiam tio unuavide ne ekzistas, la koncerna grupo tute intence ekuzas propran lingvon, kiun oni nomas eble ĵargono, por krei internan solidarecon kaj fremdigi nemembrojn de la grupo.

Plej ofte tamen la lingva diverseco jam ekzistas. Oni ne sufiĉe funde atentis la grandan diversecon eĉ interne de lingvoj teorie komunaj. Sur kampo de la t.n. ”angla” lingvo, ekzemple, la diferencoj inter la lingvoj angla, usona, aŭstralia, k.a., estas pli profundaj ol oni ĝenerale atentis. Ne temas nur pri diferencoj de prononcado — kvankam ili estas tre gravaj — sed ankaŭ pri leksikologiaj kaj semantikaj diferencoj. Ne nur sama objekto povas en du landoj nomiĝi tute malsame, sed pli grave: vorto aŭ frazo ĝentila en Britujo povas esti ofenda en Usono, kaj inverse. Usono eĉ kreis apartan ortografion; tion oni faris por laŭdire raciigi la idiotan anglan ortografion, sed rezultiĝis malmulta raciigo kaj tre multa usoneco. Mi legis, ke la situacio inter la hispanlingvaj landoj similas al tiu de la angla lingvo.

Do la teorie sama lingvo en diversaj mondpartoj montriĝas tamen malsama. Sed ankaŭ interne de unu geografia kaj politika homgrupo, kiun oni nomas ”ŝtato” aŭ ”nacio”, la sama lingvo alprenas plej diversajn formojn, ĉu de prononcado, ĉu de vortprovizo, ĉu de gramatiko. Samlandanoj ofte klasigas sin reciproke laŭ la lingvouzado.

Per tio ĉi mi ne celas supozigi, ke kulturaj diferencoj en si mem reprezentas ion malbonan. Male, la diverseco de kulturoj estas etendiĝo de individua diverseco, kaj buntigas la vivon. Ni ĉiuj ŝatas variecon. Fremdaj kulturoj vekas nian scivolemon, kaj homoj fratiĝemaj deziras ekkoni kaj kompreni ilin. Bedaŭrinde, la kono kaj kompreno tro ofte restas tute supraĵaj. Tro ofte en la fino ni vidas nur stereotipojn. Tro ofte ni rimarkas nur tion, kion vidi ni estas kondiĉitaj: se oni supozigas aŭ eĉ instruis al ni, ke la skotoj estas avaraj, la italoj estas eksplodemaj, aŭ la japanoj estas senemociaj (mi citas nur hazardajn ekzemplojn), ni estos ĝenerale tre kontentaj se ni renkontas unu-du avarajn skotojn, eksplodemajn italojn aŭ senemociajn japanojn — senkonsidere pri tio, ke la proporcio de avaro, eksplodemo kaj emocio nepre ne multe varias inter la diverslandaj loĝantaroj — ĉar niaj antaŭjuĝoj ŝajnos pravigitaj. Feliĉe ekzistas multnombro homoj pli saĝaj kaj bonvolemaj ol tio. Sed la deziro trempiĝi en alian kulturon renkontas diversajn malhelpojn, antaŭ ĉio la lingvan

diversecon. Se homoj ne povas ĝisfunde komunikiĝi, ili ne povas kompreni reciproke la kulturojn. Tio ofte validas eĉ interne de unu lando. Mi konis foje samurbanon, kun kiu mi perfekte kompreniĝis en Esperanto, sed kies urbega dialekto kun siaj fremdkulturaj implicoj kapablis starigi inter ni altan barilon — aŭ ĉu temis pri **mia** universitata dialekto kaj ĝiaj fremdkulturaj implicoj? Ĉiuokaze, ni preferis konversacii nur en Esperanto. Manko de homa interkompreniĝo kapablas rezultigi terurajn tragediojn. Tro facile homoj malicaj povas kredigi al ni, ke iu alia popolo konsistas el estaĵoj ne vere homaj, ke tiu alia popolo estas iel kulture malsupera al ni. Ĝi parolas lingvon barbaran, al neniuj komprenneblan, ĝiaj kutimoj estas krudaj, ĝi ĉiuokaze fundamente diferencas de nia propra, kulture supera, popolo. Tion klare konstatis kiel hebreo en diversrasa lando d-ro Zamenhof. Tute prave li konstatis, ke unu nepra antaŭkondiĉo por eviti militojn kaj pogromojn estas tio, ke la homoj povu interkompreniĝi per

ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO AL LA 66a UK DE ESPERANTO:

Proksimeco de la interesoj

MI ĜOJAS novan fojon direkti mesaĝon al la Kongreso de Universala Esperanto-Asocio, kiun mi estis invitita alparoli antaŭ kvar jaroj en Rejkjaviko.

Mi kaptas la okazon por konfirmi la intereson, kiun Unesko havas por la agadoj de UEA, kaj mi nepre konfirmas ĝian grandan kontribuon al la disvolviĝo de internacia komunikado, interkompreniĝo inter la popoloj kaj pere de ili al plifortikigo de la paco en la mondo, kiuj estas la ĉefaj celoj de nia organizaĵo.

Ĉi-jare UEA elektis la temon "Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj". Tiu temo kunligiĝas kun la ĉefa intereso de Unesko. Nia organizaĵo senĉese batalas kontraŭ la ignoro de aliaj kulturoj — obstaklo al bona kunvivado inter la nacioj — kiu naskas miskomprenojn kaj konfliktojn. Tia agado de nia organizaĵo celas antaŭenigi pliprofundigitan kulturan informadon kaj lingvoinstruadon, ne nur de la lingvoj de la najbaraj landoj, sed de la lingvoj de pli granda disvastiĝo, por malfermi en la lingvaj bariloj trapasejojn, kiuj permesas la disvolviĝon de la komunikado kaj dialogo inter la homoj kaj ampleksigon de la kulturoj en reciproka respekto de individuaj trajtoj.

Ĉi-cele mi bondeziras, ke la kunlaboro inter UEA kaj Unesko daŭru en la plej bonaj kondiĉoj kaj ke la laboroj de tiu Kongreso estu instruicaj kaj sukcesplenaj.

anstataŭante Amadou Mahtar M'Bow,

Ĝenerala Direktoro de Unesko,

Federico Mayor,

Anstataŭa Ĝenerala Direktoro de Unesko

komuna lingvo. Nur naivulo supozus, ke tio estas la sola kondiĉo. Ankaŭ pere de komuna lingvo oni povas kvereli. Sed almenaŭ la kverelo estas komprenata, kaj diskutibla sur komuna bazo. Pli grave, per komuna lingvo oni povas konstati proprasparte la komunan homecon de la popoloj.

Kultura diverseco do, krom se ĝi estas manipolata pro fremdigaj celoj, estas fenomeno agrabla kaj interesa. Ni devas ĝin defendi. Antaŭ ĉio, ni devas ĝin defendi kontraŭ la atencoj de la t.n. grandaj lingvoj, kies posedantoj pli aŭ malpli konscie aspiras ian lingvan hegemonion. Se ni atente studas la aktualan situacion en plej diversaj mondpartoj, ni facile konstatas ke, samkiel ĉionvendejoj iom post iom bankrotigas la kvartalajn butiketojn, tiel la grandaj lingvoj malaperigadas, pli aŭ malpli rapide, la lingvojn — kaj pro tio grandparte la kulturojn — malgrandajn. En preskaŭ ĉiu parto de la mondo ni povas rimarki minoritatajn etnajn grupojn, kiuj estas devigataj submetiĝi al la lingvo kaj kulturo de pli potencaj najbaroj, pro kaŭzoj politikaj kaj ekonomiaj. Tre ofte ilia kulturo dekadencas kaj fariĝas plorinda speco de turisma folkloro, kiu estas kulturo falsa, ĉar ĝi ne fontas el la vivo de la popolo sed el la neceso plaĉi al homoj fremdaj. Povas rezultiĝi eĉ pli malbonaj sekvoj. Tiuj, kiuj ĉeestis nian 62an kongreson en Rejkjaviko, travivis mirindan sperton de la dramo "Inuk", kiu bildigis la spiritan detruigon de la eskimoj pro alveno de la kokakola civilizacio. Pro tiu prezentado mi vidis fortikajn virojn plori, kaj prave plori. Sed ho ve! tro malfruas plorado, kiam jam plenumiĝis la detruo. Ĉu ni vere deziras, ke nia kultura bunteco daŭre reduktiĝu, ĝis restos nur ia deko da lingvoj imperiismaj, inter si reciproke luktantaj, kun siaj truditaj kulturoj?

Eble tiu situacio estus tolerebla se vere ĝi solvus la problemojn de interhoma komunikiĝo kaj forigus la lingvaj kaj kulturajn barojn. Io simila estas tamen neantaŭvidebla. Kiu volas aŭ kapablas scipovi eĉ supraĵe dekon da lingvoj? Kiu volas akcepti iun ajn lingvon truditajn imperiisme de ekstere? Ĉu reciproka respekto inter diversaj popoloj estas fantazia revo?

Ni, hodiaŭaj ĉeestantoj, scias, ke ĝi estas nek revo nek fantazia. Per la vivanta sed neŭtrala, sennacia sed kultura, internacia lingvo Esperanto interkomunikiĝas kaj reciproke sin respektas homoj el la plej diversaj nacioj, rasoj kaj kulturoj el la tuta mondo. Kiel tion esprimis Zamenhof en sia parolado al la Unua Kongreso:

"... en nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj, neniuj humiliĝas, neniuj sin ĝenas; ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ... ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke ... amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo."

La ĉefa, kaj efektive la sola findinde fortika, lingva ponto inter la diverslandaj homoj estas do Esperanto.

Ĝis kioma grado ĝi estas, aŭ povas esti, ponto inter la kulturoj? Tion vi certe diskutos dum la diversaj kunvenoj dediĉotaj al nia kongresa ĉeftemo, kaj la rezultojn de via diskutado mi atendas kun granda scivolo. Dume mi volas starigi al vi ankoraŭ unu tezon, kiu tekstas jene: Kiel homo interne de sia lando povas aparteni al pli ol unu kulturo, tiel ankaŭ la homo tra la tuta mondo povas aparteni ankaŭ al kulturo, kiu ampleksas la tutan homaron, se li tion entreprenas pere de Esperanto. Pere de Esperanto ni jam konstruadis dum 94 jaroj kulturon monds kalan, kiu ne plu estas ekskluziva, sed estas **inkluziva**, t.e. ĝi estas bazita sur la spertoj kaj emocioj, kiuj estas komunaj al la

homaro kiel tuto. Kiel pruvas tre multaj ekzemploj, homo prudenta povas, en kultura senco, sen skizofrenio esti samtempe nacio kaj mondano. Sian naciecon oni esprimas per sia nacia lingvo, sian mondanecon per Esperanto.

Tiu ĉi gastama lando Brazilo, lando de nia 66a UK, proponas al ni tre oportunan metaforon. Brazilo estas evidente ilo por brazi. Brazi signifas hardluti, t.e. kunfiksi metalajn pecojn, ne fandante la koncernajn pecojn mem. Do per nia Brazilo ni kunfiks nin kiel homojn, tamen ne fandante kaj ne perdante niajn individuajn karakterizojn.

William Auld

MALFERMA SOLENAĴO:

Malekvilibro tagorda

"LA MALFERMO kutime havas pli intiman karakteron ol la Inaŭguro, ĉar ĝi rilatas pli al ni mem kiel esperantistoj; la Inaŭguro esence pli rilatas al kontaktoj kun la ekstera mondo." Tiel Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA, kiu prezidis ĉi tiun kongresan kunsidon, klarigis ĝian karakteron. La tradiciaj salutoj de la reprezentantoj de la landaj asocioj, en sia daŭra transformiĝo dum la lastaj jaroj, atingis en Brazilo rekordan mallongecon: 5'46" (kvin minutoj kvardek ses sekundoj). Tion oni dankas al Stefan MacGill, direktoro de la CO de UEA, kiu anoncadis la nomojn de la landoj kaj iliaj reprezentantoj (entute 44), kiuj stariĝis, dum la publiko pli-malpli senĉese aplaŭdadis dum tiu kurioza vojaĝo tra la alfabeto kaj la mondo.



Novaĵo estis raporto de la ĝenerala direktoro de UEA pri la organiza evoluo (ĝi aperos en la oktobra numero). S-ro Ragnarsson anoncis la alvenon de la skribaj salutoj, kiujn al la Kongreso sendis Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Mondpaca Esperantista Movado kaj prof. Carl Støp-Bowitz, antaŭa vicprezidanto de UEA. Alia listo de skribaj salutoj, prezentita de d-ro Humphrey Tonkin, estrarano pri eksteraj rilatoj, estis multe pli longa. Temis pri la salutoj de internaciaj neesperantistaj organizaĵoj: Monda Federacio de Asocioj de Fremdlingvaj Instruistoj, Monda Asocio de Kamparaj Virinoj, Internacia Federacio de Katolikaj

Universitatoj, Organizo Monda por Turismo, Monda Federacio de Organizaĵoj de Instruista Profesio, Monda Asocio de Skoltinoj, Monda Asembleo de Junularo, Internacia Federacio de Societoj de Aŭtoroj kaj Komponistoj, Internacia Kooperativa Alianco, Internacia Asocio de Universitatoj, Internacia Federacio de Universitataninoj, Asocio de Universitatoj de Brita Komunumo, Unio de Internaciaj Asocioj, Monda Federacio de Laboro, Monda Juda Kongreso, Internacia Ligo de Virinoj por Paco kaj Libereco, Monda Organizo de Skoltoj, Monda Federacio de Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj. "Nekredeble longa listo, ĉu ne?", komentis d-ro Tonkin mem. Nu, tio tamen ne estis la fino de la listo, ĉar en la salono ĉeestis reprezentantoj de Monda Packonsilantaro, Internacia Konferenco pri Homara Unueco, Eŭropa Klubo kaj Internacia Kibernetika Asocio. Ili ĉiuj parolis. Feliĉe, esperantistoj (F. Simonnet kaj prof. H. Frank) reprezentis la du laste menciitajn organizaĵojn kaj ne necesis interpreti tiujn salutojn. Alie, ankaŭ la Malfermo fariĝus publika ekspozicio pri la lingva problemo, kia iasence estis la Inaŭguro. Krome, skribajn mesaĝojn sendis ankaŭ: Esperanta Parlamenta Grupo de Britio, Internacia Bahaa Komunumo, Nacia Spirita Bahaa Asembleo de Brazilo, Guberniestro de la ŝtato Paraná (Brazilo) kaj Rekapablago Internacia (monda organizaĵo de handikapuloj).

Fine, venis vico al la parolado de la prezidanto de UEA, s-ro Grégoire Maertens. El tiu verva pledo pri la plibonigo de la informado ni aperigas ĉi-numere la plej interesajn partojn. La kongresanoj per varma aplaŭdo salutis la proponon sendi gratulotelegramon al prof. Gaston Waringhien, pro lia 80-jariĝo, al Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu festas 60 jarojn de sia ekzisto, kaj al Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, kiu samtempe kongresis en Zagreb (Jugoslavio) kaj kiu en Brazilo fariĝis aliĝinta faka asocio de UEA. Tradicie, la malferma solenaĵo finiĝis per "La Espero", en kies interpreto pli laŭtis granda brazila orkestro ol la kongresanoj mem.

Ni havas por la fino de ĉi tiu raporto kelkajn demandojn: Kial ne-movadaj organizaĵoj ricevis en la Malfermo ekscese pli da atento ol la landaj asocioj de UEA? Kiel eblas, ke la tempo dediĉita al, ekzemple, Interna-

cia Konferenco pri Homara Unueco aŭ Eŭropa Klubo grave superas la tempon, kiun oni donis al ĉiuj landaj asocioj kune? Ĉu la Estraro aŭ iu alia vere kredas, ke la kongresanoj pli interesiĝas pri "aĝo de Akvario" (Amforo?) kaj "kosma ordo" (!) — jes, unu el la salutantoj parolis pri tio — ol pri progreso de la Esperanto-movado en diversaj landoj tra la mondo? Kial oni rezignis pri la sukcesa stokholma eksperimento intervui la reprezentantojn de la landaj asocioj? Pro grava malobservo de ĉi tiuj demandoj, la bela frazo de la prezidinta s-ro Ragnarsson, komence de ĉi tiu teksto, restas ankoraŭ nur revo, realigenda.

EL LA MALFERMA PAROLADO DE LA PREZIDANTO DE UEA:

Esperanto estas nia libereco

... ĈIUTAGE pligrandiĝas la bezono de internacia lingvo, kiu samtempe solvus la problemojn de la komunikado kaj de la protekto de propraj trajtoj de unuopaj etnoj. Ni, Esperanto-parolantoj, ĉirkaŭrigardas kaj simple ne komprenas, kial la alprenataj solvoj neniam estas radikalaj kaj neniam kontentigaj, dum ni scias, ni tre bone scias, ke la Internacia Lingvo funkcias adekvate.

Tamen, se ni iom primeditas la situacion, ni tiam konstatas, ke multaj homoj aŭ ne scias pri Esperanto aŭ ignoras la efektivajn eblojn de la Internacia Lingvo. Ni povas konvinki la homojn pri la ekzisto de tiuj eblecoj, sed konvinki ilin pri la neceso eklerni la lingvon — tio jam estas pli malfacila.

En la nuna evolufazo de nia Movado, ni do konstatas la bezonon de la Internacia Lingvo kaj nia specifa tasko konsistas en la diskonigo de la avantaĝoj de neŭtrala internacia komunikilo. La Movado nun estas sufiĉe forta por fronti la defion de la informado. Per la vorto "Movado" mi celas la tutan mozaikon de niaj organizaĵoj kaj institucioj, kaj ne nur Universalan Esperanto-Asocion mem. Tamen, por plenumi la taskojn de la informado necesas atenti la jenajn kondiĉojn:

- adekvata eluzo de la ekzistantaj strukturoj,
- daŭra kunevoluo kun la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj,
- unueco de ĉiuj ĉirkaŭ la baza ideo de la Internacia Lingvo.

Universala Esperanto-Asocio, ĉiuj ĝiaj gvidaj organoj kaj instancoj, faras sian plejebelon por respekti la diversecon de opinioj, eĉ se oni foje riproĉas tion al ni. Surbaze de la reciproka respekto, ĉiuj movadanoj devus retrovi sin ĉirkaŭ la unueca baza ideo de Esperanto. Mi forte pledas por tuja ekkunlaboro inter ĉiuj niaj internaciaj asocioj, niaj regionaj instancoj, naciaj organizaĵoj, lokaj grupoj, fakaj movadoj, neneŭtralaj organizaĵoj. Tie, kie kunlaboro jam ekzistas, ĝi estu pli bone organizita.

Mi ĉi tie povas anonci, ke UEA post iom da tempo lanĉos diversajn konkretajn projektojn, kies celo estas ankoraŭ pli adaptiĝi al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. Por ilustri al vi la direkton en kiu la Estraro pensas, mi metas antaŭ vin du ideojn pri la ebleco utiligi sur la kampo de la informado la ekzistantajn strukturojn:

1) Niaj landaj organizaĵoj devas informadi enlande per ĉiuj rimedoj, unuavice pere de la nacia lingvo aŭ naciaj lingvoj. Ni nomu tion horizontala informado. Aliflanke, laŭ la linio de la vertikala informado, ĉiu unuopa Esperanto-parolanto devus ĉerpi la ideojn kaj novajn argumentojn por sia informa laboro el la internacia Esperanta gazetaro. Pro tio la gemembroj de la naciaj organizaĵoj bezonas pli grandan elektoeblecon inter diversnivelaĵoj kaj diversenhavaj internaciaj periodaĵoj. Sed, ripete, por la enlanda informado ni bezonas ĉefe nacilingvan, teknike belaspektan, informriĉan gazeton. Se landa asocio eldonas revuon en Esperanto, ĝi, unuflanke, blokas la informan pliriĉiĝon de sia membraro, kiu do ne sekvas la evoluojn je la internacia nivelo, kaj, aliflanke, ĝi fordiboĉas siajn limigitajn fortojn kaj ne kapablas okupiĝi pri regula kaj bona informado de sialanda neesperantista publiko. Se la financaj kaj homaj fortoj ne permesas la eldonadon de du bonkvalitaj revuoj, nacilingva kaj Esperanta, tiam oni en ĉiu lando nepre decidiĝu favore al la nacilingva revuo, ĉar la baza informa materialo en Esperanto ja troviĝas en la internaciaj movadaj periodaĵoj.

2) La dua ideo rilatas la Delegitan Reton de UEA. Tra la jardekoj de ĝiaj ekzistado kaj funkciado, ni kutimiĝis al ĝiaj servoj kaj ni ne ĉesas laŭdi ĝian unikecon. Tamen, ĉu ni iam pensis ankaŭ al neesperantistoj malfermi la Delegitan Reton, servi ankaŭ ilin pere de Esperanto? Ni enketu ĉe la delegitoj mem, por vidi kiel organizi tion. Ni esploru, ĉu necesas eble pagi la helpon kaj la servojn, kiujn la Delegita Reto pere de Esperanto povus disponigi al la eksterstarantoj. La Estraro, kiu studas ĉi tiujn demandojn, volonte aŭdus viajn reagojn pri ĉi tiu ideo.

Fine, mi volas mencii al vi, ke mi foje, veturante tra mia urbo, rimarkis sur veturilo antaŭ mi sloganon, kiu tekstis: "La aŭtomobilo estas mia libereco". Mi pensis, ke la slogano estas prava, sed nur parte: aŭtomobilo ebligas pli facile moviĝi tra la urbo, facile ekskursi kaj ferii, sen dependi de la horaroj ktp. Mi pensis, ke tiu slogano pli prave povus aparteni al la Internacia Lingvo. Per la lernado de unu fremda lingvo oni malkovras unu fremdan kulturon, aliras unu fremdan popolon; per plia fremda lingvo oni proksimiĝas al alia popolo... Sed, per Esperanto la pordoj de multaj popoloj kaj kulturoj — iom post iom de ĉiuj — malfermiĝas. Ĝi samtempe protektas la propran etnan kulturon en ĉi tiu mondo en kiu ankoraŭ la ĉefrolanto restas tiu kiu estas la plej forta. La Internacia Lingvo forigas la danĝeron de la perdiĝo, de la strangolo de niaj unuopaj etnaj kulturoj. Mi nun estas forte konvinkita, ke Esperanto estas nia libereco.


Grégoire Maertens

Komitato kun kvorumo

UNIVERSALAJ KONGRESOJ delonge rolas kiel financa puno al la komitatanoj de UEA, por eĉ ne paroli pri la estraranoj. Se vi apartenas al unu aŭ al ambaŭ tiuj gravaj movadaj instancoj, oni simple atendas, ke vi ĉeestu la Kongresojn. La kostojn pagas vi mem: la vojaĝon, la hotelon, la manĝojn, ĉion. Feliĉe, oni ne postulas la pagon de la kongresa kotizo. Prave, cetere, ĉar komitatanoj kaj estraranoj plej ofte ne kongresas, ili senĉese migras de kunsido komitata al kunsido komisiona, de tie al agadgrupo, renkontiĝo, intervjuo, deviga akcepto, preparolo ktp. Observu foje estraranojn, ekzemple, komence kaj fine de kongreso. Vi rimarkos, ke ili sveltigis, ĉar ili fakte ne havis manĝokostojn. Ili ne manĝis, ĉar la kongresa programo ofte ne atentigas tiajn hombezonojn.

Tamen, al Brazilio venis sufiĉe el tiuj konstantaj "punatoj". Kun 36 komitatanoj kaj 17 anstataŭantoj, plus 2 observantoj, la Komitato havis kvorumon. La Estraro estis kompleta, kio ne ĉiam okazas eĉ ĉe la kongresoj en Eŭropo.

La Komitato en Brazilio kunsidis kvarfoje dum proksimume 14 horoj. Tre multa laboro estis farita en diversaj komisionoj, kiuj poste proponis "rezoluciojn"



En Brazilio la Komitato de UEA decidis honori: Bakin (supre maldekstre), S.N. Podkaminer (supre dekstre), C. Stöp-Bowitz (sube maldekstre) kaj L. Friis (sube dekstre).

al la Komitato. Akceptiĝis 17 tiaj rezolucioj, inkluzive de la du, kiujn vi trovas en ĉi tiu revunumero. La aliaj temis pri: ellaboro de nova Ĝenerala Regularo de UEA, novaj Honoraj Membroj, lanĉa agado, statutoj de landaj asocioj, edukado, ekzamenoj, instruado, eksteraj rilatoj, UN kaj Unesko, Centjara Jubileo 1887-1987, parlamenta agado, planado, esploro kaj dokumentado, faka agado kaj turismo. Tia anticipa komisiona pristudo de la demandoj estis nepre necesa en Brazilio, ĉar la komitatanoj ricevis sian kunsidan dokumentaron nur ĉe la alveno al la Kongreso.

Kion enhavas tiu abunda rezoluciaro? Jen provo resumi la plej interesajn el tiuj dokumentoj:

UEA jam du-tri jarojn (ekde la akcepto de la nova Statuto) baraktas kun la malnovaj regularoj, inkluzive de la baza — la Ĝenerala Regularo. La Komitato nun insistas pri la renovigo de tiuj esence gravaj dokumentoj. La renovigo okazos kun kiel eble plej vasta kaj plej publika pridiskuto de novaj ideoj. Vi legos pri tio baldaŭ en ĉi tiu revuo. Kiel montras la ilustraĵo,

Kongresa rezolucio

Universala Esperanto-Asocio, kunsidante en Brazilio de la 25a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1981, dum la 66a Universala Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestas pli ol 1700 partoprenantoj el 50 landoj,

notante la danĝeron de ĉiam pli fortiganta influado de la amaskomunikiloj en la direkton de senindividuigo de la homoj en la moderna amasocio,

notante la minacon de ĉiam pliiĝanta submetiĝo de la homoj al unudirekta influado de informoj, al kiuj ili ne havas la ŝancon reagi krom pasive,

notante, ke kultura influado de la grandaj lingvoj de la hodiaŭa mondo tendencas subigi kaj eventuale forigi la malgrandlingvajn kulturojn, kaj senigi ties anojn de la rajto je propra kulturo,

atentigante pri la celoj de la Internacia Lingvo Esperanto krei ponton inter la popoloj kaj tiel kontribui al vera interkomuniko inter ĉiuj homoj sur la terglobo sur neŭtrala lingva bazo,

konstatas, ke aktiva partopreno de la individuo en kultura interagado estas ebla nur tiam, kiam li/ŝi disponas pri "pontoj" permesantaj dudirektan komunikadon,

konstatas, ke la Internacia Lingvo Esperanto jam pruvis siajn kapablojn servi kiel taŭga dudirekta ponto inter diferencaj kulturoj,

konstatas la etikan valoron de la Internacia Lingvo Esperanto en interhoma kaj interpopola komunikado, **alvokas** al individuoj, etnaj grupoj, nacioj, ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj agnoski la atingojn kaj valorojn de la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝian potencialon krei plenkomunan ponton inter la diversaj kulturoj de la mondo, cele al formiĝado de aktiva kaj konscia kulturo, kaj reprezenti, sur internacia skalo, la plej altajn homajn valorojn kaj aspirojn.

akompane al ĉi tiu teksto, Honora Patrona Komitato de UEA riĉiĝis per la nomo de la elstara ĉina verkisto kaj esperantisto Bakin. Al la Honoraj Membroj de la Asocio aldoniĝis: la dana pioniro Lorenz Friis, la sovetia movada eminentulo Simeon Naumoviĉ Podkaminer kaj la norvega scienculo Carl Støp-Bowitz. Unu el la resolucioj insistas pri la graveco de personaj kontaktoj inter la funkciuloj de UEA kaj la landaj organizaĵoj; ĝi ankaŭ invitas al pli aktiva rolo de UEA rilate la eldonadon de nacilingvaj lerniloj de Esperanto, starigon de regionaj libroservoj kaj kreon de aktivuloj en landoj sen organizita E-movado. Laŭ alia el tiuj dokumentoj, UEA baldaŭ devos konkretigi siajn planojn pri diversgradaj lingvaj ekzamenoj. En la estontaj Universalaj Kongresoj nepre enestu "Tago de la lernejo", dum kiu oni pristudu i.a. la staton de la lerneja instruado de la Internacia Lingvo.

Aparta komitata dokumento rilatas la "Planon por la periodo 1983-1987", kiun la Estraro ellaboris en 1979 kaj reekzamenis dum sia marta kunsido ĉi-jare. Ankaŭ la Komitato konsideras tiun planon "malneto",

ĉar la ideo estas vaste diskutigi ĝin, ne nur kun aliaj Esperanto-organizaĵoj sed ankaŭ kun ĉiuj unuopuloj pretaj kunlabori. Ni intencas amplekse prezenti la planon en la oktobra revunumero.

Sur la kampo de la eksteraj rilatoj, la Komitato rezoluciis favore al la stabiligo de la financa bazo por la Nov-Jorka Oficejo, pli vasta utiligo de la bulteno *UN kaj ni* kaj intensigo de la kontaktoj kun Unesko kaj — pere de la ŝtataj misioj ĉe UN en Nov-Jorko — kun la influa grupigo de nealiancitaj landoj. La Komitato okupiĝis ankaŭ pri la kampo de esploroj kaj dokumentado, kun precipa atento al la revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*. Laŭ unu el la resolucioj, oni atendas revivigon de la informilo *Novaŭletero por interlingvistoj* kaj reaperon de la revuo *Esperantologio* en la formo de jara kolekto de ĉi-kampaj studoj.

Kompreneble, kiel ĉiujare, la Komitato traktis ankaŭ la Estraran Raporton kaj akceptis ĝin sen signifaj rimarkoj. Kvankam la novaj elektoj okazos nur en 1983, la Komitato en Brazilio starigis apartan komisionon, kiu okupiĝos pri tio dum la sekvantaj du jaroj.

KUNSIDOJ DE LA ESTRARO:

Estraro en Bona Espero

KIEL REGULA ĈEESTANTO de ĉiuj estrarkunsidoj dum la lastaj ok jaroj, mi ne hezitas deklari, ke la kunsidoj en Brazilo estis sendube la plej interesaj. Verdire, tiu epiteto ne koncernas la kunsidojn en Brazilio mem. La programo antaŭvidis kvin tiajn renkontiĝojn dum la kongresa semajno. Ili okazis kaj, kiel kutime, sukcesis tralabori nur parteton de la ampleksa tagordo. La pleja intereseco rilatas la du kunsidajn tagojn, kiujn la kompleta Estraro de UEA pasigis en Bona Espero. Vi ja memoras, ke tio estas sociekperimenta bieno, kiun gvidas Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia. Kvankam mi multe pli volonte gvidus vin tra la savana pejzaĝo de Bona Espero ol tra la senekscita estrara tagordo, mi nun ne volas fordiboĉi tiun "bonesperan" temon, pri kiu nia revuo jam delonge ŝuldas ion al la legantoj. Ni do nepre revenos al la temo, baldaŭ. Nun la ekscitaĵoj de la estrara tagordo en Brazilo:

Ĉio enestis tiun tagordon. Ĉio de la fundamento de la roterdama domo de UEA ĝis la Jubilea Jaro 1987. Ne estas por vi novaĵo diri, ke la Centra Oficejo de UEA spertas personaran krizon pro baldaŭa foriro de du kunlaborantoj. La solvo de tiuj problemoj estas survoje kaj ĉiuj esperas, ke ĝi montriĝos pli longdaŭra ol kutime. Ne malpli da atento iris al la aliaj tri oficejoj de la Asocio (Antverpeno, Budapeŝto, Nov-Jorko). Kiel vi scias, la Grafika Centro baldaŭ translokiĝos al la nova domo de Institucio Hodler en Antverpeno, la Nov-Jorka Oficejo spertas la foreston de firma financa bazo, Scienca Eldona Centro (SEC) en Budapeŝto frontas la kutimajn ekfunkciajn problemojn. La Estraro nun decidis nomi d-ron O. Haszpra gvidanto de SEC. Helpe de Hungara Esperanto-Asocio videblas respondoj

ankaŭ al aliaj demandoj, kiuj staras antaŭ la plej nova oficejo de la Asocio. Se vi sekvas la mondan politikan vivon vi certe scias, ke Nov-Jorko mem, kiel urbo, ne sukcesas solvi siajn financajn problemojn kaj jam de jaroj dancas ĉe la rando de bankroto. Nu, nia oficejo en tiu urbo ne fartas pli bone kaj ne fartos, se UEA kaj la Movado ĝenerale ne trovos medikamenton por sanigi ĝian financon. La Estraro nun faris kelkajn fajrobrigadajn decidojn, sed tio ne sufiĉas. Se vi mem povas almenaŭ helpeti, ne hezitu fari tion.

Vi eble memoras, ke ni post la estrarkunsido en decembro pasintjare atentigis vin, ke la buĝeto de UEA en 1981 ne antaŭvidas pli ol dek numerojn de nia revuo ĉi-jare. La tiam esprimitaj esperoj de la Estraro trovi la rimedojn por eldoni specialan revunumeron dediĉitan al novuloj nun definitive ĝas. La novembra revunumero ĉi-jare estos speciala. Ĝia gastredaktoro estos s-ino Anna Brennan, redaktoro de la Jarlibro de UEA kaj de la periodaĵo *Sekso kaj egaleco*. La numero "prunteprenos" de ĉi tiu revuo nur la nomon kaj la ĝeneralan grafikan aspekton, sed estos tute alitema, manipulos nur limigitan kvanton da vortradikoj kaj fariĝos "facila" kompletigo ankaŭ de via jarkolekto. Ĝi ja aperos en pli granda eldonkvanto kaj distribuiĝos por sondi intereson pri samnivela estonta periodaĵo.


Pluraj aliaj decidoj de la Estraro rilatas la eldonan kampon. Ni ne mencias la eldonotajn titolojn ĉi tie, ĉar en la pasinteco montriĝis, ke estas pli facile fari la decidojn ol efektive realigi la eldonprojektojn. Unu escepton ni ja faras menciante, ke UEA publikigos novan eldonon de *Esperanta antologio*, kiun komplete reredaktis kaj kompletigis W. Auld. Tiu ampleksa volumo apartenos al speciala kolekto omaĝe al la Jubilea Jaro 1987. Pri aliaj estraraj decidoj vi informiĝos en niaj postaj numeroj aŭ simple spertos ilin en la vivo de la Asocio. Tamen, ne necesas timi.

sm

Maksimume freŝa kaj nova

ĈI TIU TRADICIA kaj novnoma kongresa sekcio notis revigliĝon en Brazilio kaj listiĝis inter la plej sukcesaj partoj de la 66a UK. Regis granda intereso pri la 34a sesio de Internacia Kongresa Universitato (IKU). Ĉiun el la 13 prelegoj ĉeestis inter cent kaj ducent kongresanoj. Eble estis unuafoje en la lastaj jardekoj, ke la prelegantoj en Brazilio venis el kvin kontinentoj. Krome, pli ol duono de la prelegantoj estis ekstereŭropanoj (pasintjare en Stokholmo 3). Nur unu (d-ro W. Bormann) el la pasintjaraj prelegintoj en IKU reaperis en Brazilio, kio signifas, ke la programo de la 34a sesio estis maksimume freŝa kaj nova. Jen eta resumo pri la prelegoj kaj aŭtoroj:

Rektoris **prof. d-ro Paulo Vieira da Silva** de la Universitato de Brazilio. En sia enkonduka prelego li skizis la teknikan revolucion, kiu okazas sur la kampo de la komunikado, kaj atentigis, ke ĝi ne nur plifaciligas la kunlaboron sed ankaŭ konfliktojn inter la homoj kaj



Ankaŭ en Brazilio la kongresa programo **apenaŭ** ebligis iom paŭzi kaj ripozi. Ĉu Internacia Kongresa Universitato kontribuas al tio per la multnombro de siaj prelegoj?

nacioj. Li kredas, ke nur la adopto de neŭtrala internacia lingvo — Esperanto — povus superi la nunan komunikan krizon kaj submeti la teknikan evoluon al la homa rego kaj evoluigo de tuthomara solidareco.

La esploristo **Tibor Sekelj** (Jugoslavio), juristo kaj muzeologo, populara aŭtoro ankaŭ en Esperanto, prelegis pri "Evolulandoj serĉas sian kulturan identecon". Sekelj esploris i.a. la demandon, kiajn ŝancojn havas Esperanto en la klopodoj de la evolulandoj liberiĝi el la dependeco de la grandlingvoj de la iamaj koloniaj

potencoj. Tute alia estis la prelego "Scienco pri artistaj farboj" de **prof. Tosihide Kuwahara** (Japanio), kiu faris belajn klopodojn populare prezenti (kun ilustraĵoj) tre specifan fakan temon. Simile agis **prof. d-ro Jannes M. Mabesoone** (Brazilo), kiu prelegis pri "Geologia historio de Brazilo". Ni lernis i.a., ke Brazilon konsistigas deko da geologiaj "provincoj" kaj ke la lando malgraŭ sia vasteco malriĉas spece kaj kvante je mineraloj.

Prof. d-ro Ottó Haszpra (Hungario), internacie rekonita hidrologo, raportis pri la "Akvoĵo Danubo-Majno-Rejno", kiu ankoraŭ dum ĉi tiu jardeko ligos Roterdamon kun Sulina (Rumanio) kaj tiel ebligos navigi tra naŭ landoj de Atlantiko al Nigra Maro. La preleganto ne forgesis emfazi ankaŭ la lingvajn problemojn, kiuj komplikas la laborojn super tia ĉi interŝtata projekto. La verkisto kaj lingvisto **Ĉen Juan** (Ĉinio) traktis movade pli interesan temon "La kontakto kaj interinfluo de homaj lingvoj". Li emfazis la rolon, kiun Esperanto povus ludi en la akcelo de la riĉigo de unuopaj lingvoj. **D-ro François Lo Jacomo** (Francio) prezentigis per spektakla temo "Kiel aspektas kvar-dimensia spaco?", kiu ŝajne tamen montriĝis tro malfacila por nefaka publiko. Iom pli facile sekvebla estis la prelego de **prof. Heikki Alikoski** (Finnlando), kiu parolis "Pri la serĉado de planedetoj per grandkampaj teleskopoj".

Simile al T. Sekelj kaj Ĉen Juan, **d-ro Werner Bormann** (FR Germanio) provis per sia kontribuo en IKU — "Kulturoj kaj lingvoj ĉirkaŭ eksterlandaj laboristoj" — kontribui al la kongresa temo. Li skizis la problemojn kaj solvojn, kiujn lia lando frontas kaj provas trovi pro la ĉeesto de kvin milionoj da gastlaboristoj kaj iliaj familianoj. La monmerkato estis la kampo al kiu ligiĝis "Pensoj pri interezo" de **d-ro So Gilsu** (Korea Respubliko). La preleganto tre elokvente gvidis la publikon tra la historio de monpruntado, kapitalo kaj interezo, starigis amason da demandoj sed donis multe malpli da respondoj. **Prof. d-ro Helmar Frank** (FR Germanio) verve prelegis pri "Kibernetika psikologio", kiun oni ofte nomas ankaŭ inform-psikologio. Frank aparte reliefigis tiujn aspektojn de la kibernetika psikologio, kiuj koncernas la lernadon de la fremdaj lingvoj.

Inĝ. Alberto Barrocas Behar (Urugvajo), kemiisto al kiu la Movado ŝuldas la siatempan fakan revuon *Kemio internacia*, traktis la popularan temon "Kelkaj ecoj de la natura akvo" kaj ilustris sian paroladon per eksperimentoj. **Prof. Alojzy Wenclewski** (Zairio) raportis pri "Fontoj de animalproteinoj en Zairio". Lia prelego, lingve iom lama, okupiĝis ankaŭ pri pli ĝenerala demando: kiel nutri la kreskantan loĝantaron de la evolulandoj.

El la anoncitaj prelegantoj mankis nur d-ro Vilmos Benczik (Hungario), kion oni sciis jam komence de la Kongreso. Estis planite, ke prof. Magomet Isaev (Soveta Unio) faru anstataŭan prelegon, sed tio ne eblis, ĉar la sovetiaj kongresanoj atingis Brazilon nur en la antaŭlasta kongresa tago.

Pri lingvo, movado, literaturo

LA 4a ESPERANTOLOGIA KONFERENCO okazis en la kadro de la 66a UK. Ĝi konsistis el tri sesioj, kiuj traktis laŭvice: la lingvon, la movadon kaj la literaturon. La sesio de la 27a de julio havis la temon "Evoluo aŭ evoluigo? La lingva estonteco de Esperanto". Faris la enkondukan prelegon d-ro F. Lo Jacomo (Francio), kiu elskizis du diversajn vojojn por la estonteco de Esperanto: evoluon (laŭ kiu la lingvo esence antaŭeniras libere) kaj pliriĉigon (laŭ kiu okazas konsciaj klopodoj direkti la lingvon). Li emfazis, ke ne eblas per lingvaj institucioj, ekzemple la Akademio, kvazaŭ perforte altrudi difinitan direkton al la lingvo. La povo troviĝas ne ĉe la Akademio, sed ĉe la eldonejoj, gazetaro ktp. La Akademio rolu ne kiel direktanto, sed kiel kuracisto. Cetere, la nuna metodo de laboro en la Akademio, kiu estas bazita sur voĉdonado, eventuale malhelpas atingon de komuna starpunkto pri esencaj demandoj kaj emas esti diverĝiga.

Kvar respondantoj prikomentis la paroladon de d-ro Lo Jacomo: s-ro F. Simonnet (Francio), d-ro W. Bormann (FR Germanio), inĝ. F. García Blázquez (Venezuelo) kaj prof. Ĉen Juan (Ĉinio). Simonnet pledis por "antaŭvida lingvistiko," per kiu oni sisteme esploru la lingvan estontecon laŭ scienca vidpunkto. Bormann kritikis la ankoraŭ tro okcidentecan aliron al la leksiko de Esperanto. Blázquez emfazis, ke la ampleksigo de Esperanto, kiu estas ja bezonata, fojfoje estas atingebla per plisimpligo. Sekvis vivoplena debato inter la partoprenantoj (kiuj nombris pli ol cent). Prezidis la kunsidon prof. H. Tonkin (Usono). La sesio de la 28a de julio estis dediĉita al la temo "La idea bazo de la Esperanto-movado". Ĝi havis formon de podia diskuto inter s-ro B. Ragnarsson (Islando), s-ro B. Moon (Luksemburgo), prof. S. Kawamura (Japanio) kaj s-ro T. Vaskó (Hungario), sub prezido de prof. Tonkin. La vidpunkto de Ragnarsson estis esence preskriba: necesas krei kaj fortigi etikan bazon por Esperanto, laŭ kiu la lernado kaj utiligo de la lingvo havas efikon je ilia vidpunkto al la mondo. Li argumentis, ke la fundamento de tiu etiko povus esti la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Moon aliris la demandon je iom pli priskriba nivelo, emfazante, ke la Esperanto-movado jam tro vastiĝis por difini ĝin surbaze de la Interna Ideo aŭ eĉ iu modernigo de ĝi. Vaskó siavice esploris la socian fonon de Esperanto. Ĉu ĝi estas simple socia fenomeno? Ĉu ĝia socia karaktero reprezentas iun unikan kvaliton? Eventuale ne. Ja la Esperanto-movado estis rekta heredanto de la movado por Volapuko kaj konsistis en tiu frua epoko el multaj el la samaj personoj kaj ideoj. En siaj rimarkoj Tonkin levis la demandon, ĉu eblas difini la idean bazon de la Esperanto-movado? Ĝis kiu

grado psikologia kaj sociologia esplorado povus helpi nin en tiu rilato? Kiel fari objektivajn studojn pri la tuta komplekso de demandoj? Li kritikis la mankon de sistemeco inter la ĝisnunaj studoj de la Esperanto-movado, inkluzive la historiajn, kaj klopodis listigi la ĉefajn kaj atentigi pri iliaj ecoj.

La 30an de julio oni esploris "La kontribuon de latin-amerikaj Esperanto-aŭtoroj al la Esperanto-literaturo". Sub gvido de la prezidanto de la Akademio, mag. W. Auld, kvar brazilaj beletristoj diskutis la temon, legis el siaj verkoj, kaj respondis al la multnombraj intervenoj kaj demandoj de la ĉeestantoj. La kvar podianoj estis: la tradukisto Leopoldo Knoedt, poeto Geraldo Mattos, poeto Roberto Passos Nogueira kaj eldonisto Gersi Alfredo Bays.

La kontribuo de Nogueira estis aparte interesa. Emfazante la fakton, ke preskaŭ ĉiuj latinamerikaj Esperanto-verkistoj estas bedaŭrinde brazilaj, kaj ke necesas evoluigi la literaturon ankaŭ en aliaj landoj de Latina Ameriko, li atentigis, ke eĉ en Brazilo multaj verkistoj ĉesis aktivi. Eble la nova revuo *Fonto* ŝanĝos tion. Nogueira havis tri apartajn sugestojn por la Esperanto-verkistoj latinamerikaj: 1) ke la Esperanto-movado pli aktive stimulu ilian talenton per provizo de taŭgaj eldonaj eblecoj, 2) ke ili dediĉu sian atenton ne tiom

Rezolucio pri handikapuloj

Universala Esperanto-Asocio, kunsidante en Brazilio de la 25a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1981, dum la 66a Universala Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestas pli ol 1700 partoprenantoj el 50 landoj, okaze de la Internacia Jaro de Handikapuloj, **aparte gratulas** Unuiĝintajn Naciojn kaj la aliajn organizaĵojn kiuj kunlaboras en la Internacia Jaro, pro ties atento al la graveco de la socia integriĝo de la multnombraj handikapuloj en ĉiuj landoj de la mondo, **konfirmas** la pretecon de Universala Esperanto-Asocio fari sian eblon kontribui al tiu socia integriĝo, **esprimas** sian intencon apliki pli striktajn kriteriojn kaj fari pozitivajn paŝojn por certigi, ke la ĉefaj aranĝoj, agadoj kaj eldonaĵoj de UEA estu kiel eble plej alireblaj por handikapuloj, kiuj uzas la Internacian Lingvon, **emfazas** la taŭgecon de la Internacia Lingvo Esperanto kiel rimedo por vastigi la horizontojn de handikapitaj personoj, malfermi al ili novajn spertojn, kaj ebligi al ili pli intensan partoprenon en la internacia vivo, **atentigas** la landajn kaj fakajn Esperanto-asociojn, aliĝintajn kaj kunlaborantajn kun UEA, pri la graveco dediĉi atenton al la problemoj de la handikapuloj, **invitas** ĉiujn Esperanto-organizaĵojn aliĝi al la enhavo de la nuna rezolucio, kaj kunlabori por plibonigi la cirkonstancojn de handikapuloj pere de la Internacia Lingvo Esperanto.

al poezio kiom al arta prozo, precipe romanoj, 3) ke ili sekvu la vojon jam klaran en la hispanlingva kaj portugallingva literaturo de la regiono, nome tiun de realismo kaj socia engaĝiĝo.

La tri sesioj de la Konferenco havis multnombrajn ĉeeston kaj, laŭ la komentoj de multaj kongresanoj, estis inter la plej sukcesaj eroj de la kongresa programo.

ĜENERALAJ KUNSIDOJ:

Vigle pri jarraporto

LA DISKUTO, kiun en la Unua Ĝenerala Kunsido provokis la Estrara Raporto, estis vigla kaj interesa. Ne ĉiuj sukcesis diskuti, ĉar du horoj montriĝis nesufiĉaj. La kunsidon gvidis d-ro R. Corsetti, la temon prezentis d-rino F. Szabó-Felső, respondis al la demandoj ĉiuj estraranoj.

Kiu starigis la demandojn kaj pri kio ili temis? La unua diskutanto estis s-ro D. Masterman (Britio), kiu atentigis, ke la renovigo de la tradicia kongresa programo ne koncernas nur la kongresorganizantojn (kiel sugestas la Raporto) sed ankaŭ la kongresanojn. La plej longan, 20-minutan, intervenon faris s-ro F.

Simonnet (Francio), kiu montriĝis esti heroldo de la t.n. "Neŭtrala Esperanto-Movado" kaj ties konferenco, kiu arigis kelkdek da partoprenantoj en Danlando iom antaŭ la Kongreso. La elpaŝo de s-ro Simonnet estis, unuflanke, provo reklami la gazeton *Horizonto*, aliflanke, peno pruvi, ke UEA "devojiĝis aŭ estas en danĝero de devojiĝo". Ĉio ĉi ligiĝis al alvoko per kiu la menciitaj gazeto kaj konferenco volus meti sin centre de la preparoj por la Jubilea Jaro 1987. Citante el la redakcia rubriko "Vi trovos" de nia junia numero, la parolanto postulis klarigon, ĉu la Estraro staras malantaŭ la tie uzitaj vortoj pri la aluditaj gazeto kaj movada grupo. Respondis la prezidanto de UEA kaj klarigis, ke la Estraro, same kiel ĉiuj aliaj legantoj, informiĝas pri la enhavo de nia revuo nur post ĝia apero. La Estraro eble ne staras malantaŭ la uzitaj esprimoj, sed ĝi en ili ne vidas misinterpreton de la asocia politiko. Maertens atentigis, ke UEA respektas la aliajn movadajn organizaĵojn kaj atendas similan respekton iliaflanke.

D-ro W. Bormann (FR Germanio) demandsignis kelkajn fortajn kvalifikaĵojn pri la okcidenteŭropaj landaj asocioj kaj ricevis respondon, ke la celo estis diskutigi la staton de la Movado en tiuj landoj. Pri la landa agado diskutis ankaŭ s-ro S. Chaves (Brazilo) kaj So Gilsu (Korea Resp.), dum T. Sekelj (Jugoslavio) parolis pri la agado en Afriko kaj ligoj kun la movado de nealiancitaj landoj. El la aliaj diskutantoj ni menciis ankoraŭ mag. Isaj Dratwer (Israelo), kiu parolis pri "tro granda redakcia korbo" de nia revuo kaj — prave — pledis por pli da atento al la rubriko "Leterkesto". Ni ne komentas ĉi tie la respondojn de la estraranoj, ĉar ili estis ĉefe direktitaj al tiuj kongresanoj, kiuj antaŭe ne estis membroj de UEA kaj ne konis detale la vivon de la Asocio.

Pontoj kaj baroj al la kongresa temo

SE EKZISTAS facilaj kaj malfacilaj kongresaj temoj, tiu de la 66a UK — "Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj" — montriĝis malfacila por ampleksa pritrakto kun amasa partopreno en la diskutoj. Tion konfesis ankaŭ s-ro B. Ragnarsson, kiu gvidis la programan parton pri la temo. Pro tio ankaŭ la Dua Ĝenerala Kunsido pli similis al prelegsesio ol al vigla diskuto (8 parolantoj), kiun atente sekvus la publiko (250 personoj). La inaŭgura parolado (vidu la paĝon 145), same kiel la tri postaj kongrestemaj prelegoj (Chaves, Ragnarsson, Tonkin) okupiĝis pri teoriaj difinoj kaj ja ilustris ilin per ekzemploj kaj situacioj el la realo, sed ĉio ĉi kune montriĝis ne esti sufiĉe firma ponto al la ĝenerala malfacileco de la temo. Ni nun emas pensi, ke la temo pli konvenus por simpozio de specialistoj, ol por amaskunveno, kiaj estas la Universalaj Kongresoj. Tamen, multa kaj interesa argumentado okazis, ĉefe en la menciitaj prelegoj, kaj ĝi enestis kajeron, kiu aperos en la serio de *Esperanto-dokumentoj*. Kompreneble, ankaŭ la Kongresa Rezolucio (p. 149) estas siaspeca resumo de la kongrestema traktado.

SOLENA FERMO:

Ĝis Antverpeno!

LA FERMA SESIO de la 66a UK subite ekhavis trajtojn de inaŭguro, ĉar ĝin per sia ĉeesto (kaj saluto) honoris la ambasadoro de Italio kaj la kulturataŝeo de la ambasado de FR Germanio. Ankaŭ la usona ambasadoro sendis bondezirojn, kion faris pliaj ekstermovadaj kaj movadaj instancoj kaj unuopuloj. La ĉefa atento tamen iris al longa, pli ol 300-vorta, telegramo sendita de la ambasadoro de Nederlando, s-ro Hein Theo Schaapveld. Ĝi estis nekutime malceremonia diplomata elpaŝo kun tre klara aprezo de Esperanto. Unu el la alineoj de la telegramo tekstas jene:

"Mi persone vidas Esperanton kiel lingvon, kiu povos efike kontribui al la monda paco kaj al pli bona interkompreniĝo inter la popoloj. Ĝi estas, laŭ mia vidpunkto, la sola lingvo, kiun povas uzi personoj de ĉiuj nacioj, sen la impreso, ke ili faras cedon al la plimulto, ĉar ĝi enhavas multajn elementojn el la ĉefaj lingvoj de la mondo." Tiel kuraĝe kaj klare Esperanton en Nederlando kapablis ĝis nun subteni nur la iama ĉefministro Willem Drees.

La cetera tagordo de la Solena Fermo estis tradicia: raporto pri la kongresaj laboroj, prezento de la kongresa rezolucio, rezultoj de la Belartaj Konkursoj, longa listo de dankoj, transdono de la Kongresa Flago, invito al la 67a UK en Antverpeno, himnokantado ktp. Kiam oni volis honori la ĉeestantajn delegitojn de UEA, leviĝis duono de la ĉeestantoj. Bela kaj kuraĝiga bildo!

Tri premioj al Mauro Nervi

Konkursis entute 105 verkoj (poezio 44, prozo 27, teatraĵo 6, eseo 9, porinfana literaturo 11, fotografio 8), el kiuj la juĝkomisiono premiis jenajn:

POEZIO: Unua premio: **Mauro Nervi** (Italio) pro *La nokto*; Dua premio: **Mauro Nervi** pro *Preludo*; Tria premio: **Mauro Nervi** pro *Kanto de Jago*; Laŭda mencio: **Rejna de Jong** (Nederlando) pro *Au clair de la lune*.

PROZO (novelo): Unua premio: ne aljuĝita; Dua premio: **Bernard Golden** (Hungario) pro *Ampruvo*; Tria premio: **N.C. Abaĝieva** (Bulgario) pro *Momento egala al heroaĵo*; Laŭda mencio: **T. Tyblewski** (Pollando) pro *La testo*.

TEATRAĴO: Unua premio: ne aljuĝita; Dua premio: **Pierre L. Ullman** (Usono) pro *Idiotigaĵoj*; Tria premio: **Spomenka Štimec** (Jugoslavio) pro *Gastamo*; Laŭda mencio: **Margaret Chaldicott** (Aŭstralio) pro *La ĝemoj de ĝemeloj*.

PORINFANA LITERATURO: Unua premio: ne aljuĝita; Dua premio, egaldive al: **Stefan MacGill** (Nederlando) pro *Frapo ĉe la pordo* kaj **Terttu Tyynelä** (Finnlando) pro *Leporido kiu deziris*; Tria premio: **Rik de Roover** (Belgio) pro *La ruĝa hirundo*; Laŭda mencio: **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) pro *Kuracisto*.

ESEO: Premio Luigi Minnaja: **Éva Tófalvi** (Hungario) pro *Rolo de la persona faktoro en la Esperanta literaturo*.

FOTOGRAFIO: Unua premio: ne aljuĝita; Dua premio: **Ivan Alberto A. Doretto** (Brazilo) pro *Lamoj*; Tria premio: **Andrée Orsolini** (Belgio) pro *Minista domaro*.

Enketo

DUM la 66a UK estis disdonita kvarpaĝa enketilo kun la peto, ke kongresanoj uzu ĝin por prikomenti la diversajn erojn de la kongresa programo, cele al plibonigo de la estontaj kongresoj.

Je la fino de la Kongreso 2,5% de la kongresanaro redonis plenigitajn enketilojn, kaj, kvankam iliaj respondoj kaj komentoj estas tre utilaj kaj interesaj, ili ne estas statistike valoraj. Tial ni ne povas publikigi la statistikan analizon ĝis estos ricevitaj multe pli da enketiloj.

Estis antaŭvidite, ke multaj kongresanoj portos la enketilon hejmen kun la intenco poste sendi ĝin al UEA. Se vi tion faris, bonvolu nun resendi ĝin. Ni certigas al tiuj, kiuj uzis la enketilojn, ke ni zorge trastudis ilin kaj profitos de la diversaj sugestoj.

NOVA TALENTO (Pokalo Harabaĝiu): **M. Borges dos Santos** (Brazilo) pro la poemo *Infana malico*.

TRADUKAJ KONKURSOJ: Kiel kutime dum la lastaj jaroj, en pluraj landoj okazis tradukaj konkursoj sub la aŭspicio de la Belartaj Konkursoj de UEA. En la 66a UK en Brazilo estas anoncitaj la rezultoj de jenaj tradukaj konkursoj: **Finnlando**: Konkursis 15 tradukaĵoj poeziaj kaj prozaj. En la poezia branĉo neniu gajnis premion, dum en la proza la unua premio ne estis aljuĝita, la duan gajnis **Erik von Hertzen**, kaj la trian **Antero Harju**. La ĉi-jara traduka konkurso en **Francio** rikoltis nur 5 konkursaĵojn, el kiuj tri gajnis premiojn: la unuan **Daniel Luez**, la duan **Jeannine Vincent**, kaj la trian la norvego **Johan Hammond Rosbach**. En la tradicia ĉiujara traduka konkurso en **Pollando** ĉi-foje partoprenis 7 konkursantoj. Premion pro proza traduko gajnis **Irena Missiuro**, kaj tiu por poezio iris al **Anna Kamieniecka**.

INTERNACIA ARTA VESPERO:

Talentoj serĉas reĝisoron

Du aspektoj de la vespero montriĝis tre kontrastaj: la kvalito de la individuaj eroj kaj la tuto kiel estetika kaj kultura artaĵo.

Rigardu la enhavon: estis seso da kantoj de la pola virina dueto "Konsonanco", japanaj dancoj kaj muziko, deko da kantoj de la argentinaj fratinoj Elsa kaj Marta Solís, pliaj japanaj dancoj ĝis la intervalo; poste, longa serio de dancoj prezentitaj de la Brazila Teatra Esperanto-Grupo (BRATEG).

Mallonge dirite, la kvalito de la diversaj individuaj eroj estis tre alta. La kantado de ambaŭ duetoj estis proksima al profesia nivelo, ofte eĉ sorĉa. La japanaj rolantoj aktoris digne kaj kantis fortike, foje akompanataj de tamburetoj kaj flutoj, por montri noo-dancojn, kiuj estas tradiciaj maskdrametoj, kaj aikidon, kiu estas sindefenda fizika arto. Fine, la brazila spektaklo estis grandioza bukedo de vive viglaj voĉoj, kolorkaskadaj kostumoj kaj svinge svarmantaj sveltulinoj. Kaj ni ne forgesu la antaŭintervalan prezentiston, Akademiestron Auld, kies tradicia skota kilto ankaŭ ornamis la scenejon dum liaj fojaj deklamaĵoj.

Estis, do, amaso da talento kaj potencialo por bonkvalita artspektaklo. Sed ĝi fiaskis pro la simpla manko de reĝisorado. La programo enhavis du pleonasme identajn erojn, t.e. la duetoj, du malsamajn prezentistojn, kio iagrade rompis la kontinuecon, malagrablajn paŭzojn inter eroj dum oni mallerte ŝanĝis la scenejon kaj, konsekvence, ĉio daŭris multe tro longe — fakte, pli ol kvar horojn post la programita komenco.

Severaj vortoj? Povas esti — sed tiuj aspektoj estas gravaj por ĉiufanka estetika sukceso. Ĉar, se lingvo estas la ponto inter kulturoj, kiel sugestis la ĉi-jara kongresa temo, bona reĝisorado estas la ponto inter programeroj.

D.L.M.



**BELARTAJ KONKURSOJ 1981
ORIGINALA POEZIO
UNUA PREMIO:**

MAURO NERVI:

La nokto

*Like a long-legged fly upon the stream
his mind moves upon silence**

W.B. Yeats

Gigantaj grizaj siloj antaŭ la aleo sin direktas al la ondoj dissiluite, apud levmaŝinoj kies pulio hurle rustoknaras en la mateno; lando de nebuloj kaj de vemuĝaj, lantaj kamionoj, kiuj vojaĝas sur asfaltaj stratoj en strio ruĝa, laŭ la misdestino al ni far trista dio profetita en temp' iama. Kaj sur la elektrajn dratojn el kupro kolektiĝas jam la birdoj, per brueto senreeĥa, rapide kaj enigme, sur la dratojn, sur la dratojn, jes ja: vi ne protestu pro la sporada flugilbato, pro la etaj okuloj, kiuj ja apertas en la nokto enorma. Kvazaŭsonĝe vi vidas nun la grizajn birdovicojn, kaj la lumturon, kaj l' imponan ŝipon; vi vidas ĉion, kion la mallumo ne povas kaŝi plu. Kaj hororaĵoj elmerĝas tiel, kvazaŭ peĉvezikoj, el la petrolo, kiu stinke ŝmacas kontraŭ la rokoj de la havenkajo; kaj l' maro, l' maro ne plu trembriletas verdblanke, kiel en somertagmezoj; ĝi hulas, milda kaj terura; milda kaj monstra, ĝi alternas ŝaŭmnigrege. La homoj ĝin observas maltrankvile, kaj elmienas kiel la pragrekoj ĉe misresona orakol' dubsenca de Apolono, trompoteksa dio;

kaj intertempe luno tracinikas super la montoj, riglas la ĉielon per senhezita mano, tiel ke la mondo ne distriĝos dum ludado de sia lasta simfonio; kaj la luno, plej afable kaj malice, al ĉiuj partiturojn distribuas.

Ekster la golfo flosas la boatoj de la fiŝistoj, ombroj en nebulo; vi aŭdas nur la bruon de l' kareno, kiu trafendas ritman ondopulson. Kaj alvenas silente, jam alvenas grandioze la oceanŝipego, celanta la havenon, kaj dishakas trankvile kaj majeste la malluman kalmon. Rapidas sur la frida akvo la vasta pruo, kiun griza ŝtalo ornamas ĉe la pinto; pli malsupre ankreg' dupinta, nigra kaj masiva, pendas el truo, kaj ĉener' ĝin ligas. En la ferdek' duvice paralelas holdlukoj: nekonebla lumserio, kiun elektro nutras el profundaj turbinoj. Disdirekten en drataro araneaĵa fluas la kurento, kaj portas vibron al la rustaj lampoj, kiuj surmaste pendas helkontraste apud la fulgo de la kamentubo: sed ne oscilas pro la ondbalanco la etaj lumoj, ĉar la ŝip' tro pezas. Apud la pobo knaras la ŝnuregoj ĉirkaŭ kapstano; sur la plank' spiralas kablaro neuzata, sed jam preta por la vinĉo. Stelaro mozaikas super la flakoj de la ŝipferdeko, inter la mastoj — kie flagoj mankas —, kaj trans la drataj elstreĉitaj retoj, kiuj l' ĉielon simetrie sekcas.

Ĉeplanke, tra malhela aperturo, kruta ŝtupar' kondukas al interno; kaj tie disbranĉiĝas koridoroj en labirinta formo. Ambaŭflanke viciĝas pordoj el dikpeza ligno: malantaŭ ili, la sengastaj ĉambroj enhavas blankajn litojn sen matracoj kaj ŝrankojn kun vestar'

sen posedanto.

La koridor-plafono havas lampojn neonajn, kiuj zume prilumadas la pordojn, brunajn kaj asepsajn. Fine de ĉiu koridor' sekreta pordo ebligas la transiron al la ejoj pli malsuperaj, kie regultaktas vapormaŝinoj kun imponaj radoj el giso; siblas la aer' opaka tra l' feraj truoj de l' metalaj valvoj. Pli sube, post malfirma ŝnureskalo, jen la holdego kaj la bruna kargo, pakajoj, kiuj plej regule stakas en ejo vasta kiel templo. Sed ankoraŭ pli malsupre kaj pli fore, kie la holdpavimo deklivetas al bilĝo (kaj l' piedo jam ekvadas en la malpura akvo grasmakula), tie, en fundo, kie jam ne ŝmacas la noktaj ondoj kontraŭ la ŝipframo, tie sidadas homo, kapenmane, kaj kaŝaŭskultas sian pensrumoron kvazaŭ insekto sur vitral' preĝeja.

Lakta mateno horizonte vagas per senkontura hel' tra la nebulo, tie, sur maro. Apud mia kajo ŝipo obtuze, unutone muĝas, eniras la havenon eksilente, kaj post manovro lanta kaj memfida navigas dekstren (nur la ondoj softe plaŭdadas kontraŭ l' kurbaĵ

flankoj). Nun

mi eksidiĝos. Kontraŭ ĉi lumturo mi jam apogas mian dorson, kaj baldaŭ mi tuŝos la humidan muskon sub miaj manoj jam maten-odoran; kaj dum la cindra tago ekprogresos, mi alrigardos la malkreskan lunon. Pri vi mi pensos; miaj gestoj haltos, mia rigardo strebos al lontano; la alta suno trovos min medita pri nokto, aŭ pri rifo en marfundo; pri iluzio, vento aŭ muziko, pri fola bildo aŭ pri song' arbitra.

Mauro Nervi
(Italio)

* Kiel longkrura insekto sur riverfluo lia menso moviĝas sur silento

Gitaro rolas orkestron

BRAZILA VESPERO estis la plej bona arta programo de la Kongreso. Tian komplimenton portas al ĝi unuavice la gitaristo Villa Verde, kiun kongresano sprite nomis "Verdi de la gitaro". Tiu eleganta majstro — tre fama en Brazilo, cetere — montris al ni alikontinentanoj, kial gitaro estas la instrumento de Latin-Ameriko. Sub la dek fingroj de Villa Verde ĝi sonas kiel tuta orkestro, ĝi flustras kaj tondras, tamburas, parolas, sorĉas. Duavice venas la unuaranga juna pianisto André Luiz Fausto de Souza, ankoraŭ studento kaj aktivulo de la junulara E-movado. Liaj manoj preskaŭ petolis per la damne malfacilaj verkoj de Villa Lobos, la plej fama brazila komponisto. Tri junularaj Esperanto-grupoj — el la nordo, centro kaj sudo de la vasta lando — kondukis al Brazilio tutan armeon da dancantaj kaj kantantaj gejunuloj. Eŭropo, ekzemple, povas nur revii pri tiaj Esperantaj ensembloj. Tre granda pluso de la tuta Vespero estas la fakto, ke ĝin preskaŭ komplete konsistigis movadaj talentoj. Mankis firma reĝisoro mano kaj la prezentanto, Amarílio Carvalho, ne sukcesis superi tiun mankon. Tamen, la tuto impresis kiel memorinda travivaĵo.

Varia Vespero okazis en la kongresejo kaj ne ĝuis la teknikajn avantaĝojn de la Nacia Teatro, kies aŭdaca

belo gastigis la Brazilan kaj la Internacian Artan Vesperojn. En tiu Varia Vespero prezentigis variaj trajo kaj maltrajo. Trafo estis la kantisto Joel de Castro, kun unu el la plej belaj voĉoj aŭditaj en niaj Kongresoj, sed maltrafo montriĝis lia akompana muziko kaj la teknikaj instalaĵoj. Trafo estis la bulgara deklamantino Vasja Petrova, maltrafo fini tian kermesan programon per korusa kantado de "La Espero". Pro suspektindaj promesoj (unue de la Bulgara Esperanto-Teatro kaj poste de la Drama Sekcio de Studenta E-Klubo el Zagrebo), la 66a UK restis sen teatra programo. Oomotanoj el Japanio provis tion lastminute savi per "teatra mateno" en la ferma kongresa tago, kiam prezentigis impresa noo-dramo. Similajn provojn faris la pupteatra trupo "Kusi-Kusi" el Peruo, sed ĝia fajna arto fordiboĉigis en nekonvena salono antaŭ plenŝtopita sed malgranda spektujo.

Simfonia koncerto en la Nacia Teatro logis trionon de la kongresanoj, kiuj trovis la programon internacivelan kaj ĝuinda.

Tute nova iniciato, sukcesa, estis la programo "Niaj poetoj sin prezentas", kiun partoprenis Auld, Ragnarsen, Diderto Freto k.a. Lerte gvidis Leopoldo Knoedt, kiu kunlaboris ankaŭ en pluraj aliaj programoj. Oni ne forgesu tiun iniciaton, sed oni planu ĝin kaj ne lasu la tuton al hazarde ĉeestantaj aŭtoroj. Sufiĉus eble ĉiujare prezenti nur unu poet(in)on.

S.M.

Kelklinie pri...

AKCEPTO: En Brazilo oni ŝajne miskomprenas la vorton "akcepto" kaj kredas, ke ĝi estas sinonimo de "prelego". Tiel okazis en Brazilio, kiam la guberniestro de la Federacia Distrikto, s-ro Alcebíades Aimé Lamaison, "akceptis" la kongresanaron. Unue la prezidanto de LKK faris al la guberniestro longegan informan paroladon pri Esperanto, por ke la guberniestro poste faru eĉ pli longan prelegon. Aldoniĝis danko prelego de la prezidanto de UEA. Ĉio bezonis interpreton. Fine, estis tamen iom da trinkaĵoj kaj ĉokoladaĵoj, provizitaj de la Kongreso mem.

ALIAJ AKCEPTOJ: S-ro Newton Rossi, prezidanto de la Federacio de Komerco de Brazilio, faris apartan akcepton por la komitatanoj kaj pluraj aliaj invititoj. Multaj ambasadoj en la brazila ĉefurbo aranĝis akcepton por la kongresanoj el sia lando: Aŭstrio, Finnlando, Francio, FR Germanio, Jugoslavio, Nederlando, Pollando k.a. Aparta akcepto okazis por la membroj de Societo Zamenhof. Ĝi estis en netaŭga ejo kaj suferis de pli da improviziteco ol UEA rajtus permesi al si en la traktado de ĉi tiuj financaj apogantoj de ĝia agado.

AŬKCIO: Duafoje aranĝita en Brazilio, ĉi tiu nova programero denove montriĝis amuza kaj — utila. En du kunvenoj (ne tre amase vizititaj) oni vendis plurajn

dekojn da objektoj, jen vere valoraj, jen interesaj aŭ unikaj kaj kuriozaj. Humphrey Tonkin estis vigla kaj kompetenta aŭkcianto, kvankam mankis tempo por plene elĉerpi liajn spritecon kaj vendistan talenton. La Aŭkcio finance rezultigis la sumon de pli ol 90 000 kruzejoj (ĉ. 2 600 guldenoj). La plej altan sumon atingis la 100-zlota pola monero dediĉita al Zamenhof — ĝi vendiĝis kontraŭ la prezo de 7 500 kruzejoj.

BALO KAJ BANKEDO: Iom nekutime por niaj kongresoj, ili okazis fine de la semajno. Tio estas malbona, ĉar la du tradiciaj programeroj ofte servas kiel vera interkona vespero. La ejo estis konvena (unu el la multnombraj klubejoj ĉe lagobordo). La Bankedo havis riĉan menuon kaj belan komencan etoson, sed ĝia memserva karaktero certe ne plaĉis al ĉiuj. Tamen, ĝuste al tio oni ŝuldas la malaltan prezon. La Balo okazis en la sama ejo kaj komenciĝis per modrevuo de ekzotikaj kostumoj, kreaĵo de la konata brazila artistino Yashira. Tro laŭta muziko kaj abundo de sudamerika ritmo ne konvenis al granda parto de la alikontinentanoj.

DOKUMENTUJO: Bela kaj ampleksa blua teko kun la kongresa emblemo enhavis la Kongresan Libron (kun suplemento), kies presinko apenaŭ sukcesis sekiĝi. Enestis kelkaj movadaj kaj iuj turismaj prospektoj, krajono, notpapero, aliĝilo por la 67a UK. Elstaris belkovrila broŝuro *Volta Redonda — la granda ŝtalproduktejo de Brazilo*.

EKSKURSOJ: Sufiĉe da plendoj aŭdiĝis. LKK asertas, ke tiuj aranĝitaj de ĝi mem (urbaj rondveturoj) bone funkciis, dum la tuttagajn kaj postkongresajn ekskursojn organizis privata vojaĝagentejo. Nu, tio tamen ne signifas, ke LKK ne respondecas ankaŭ pri ili, ĉar ĝi faris kontrakton kun la agentejo. La plendoj rilatis al la malfruiĝoj kaj malobservo de la anoncita ekskursprogramo. Ni emas opinii, ke tio unuavice ŝuldiĝas al la ĝenerala vivmaniero de la brazilanoj, kiuj neniam rapidas, kiuj ĉiam havas tempon . . .



EKSPOZICIOJ: La vicprezidantino de Universala Artista Ligo de Esperantistoj (fondita en 1978), Maria Almada, ekspoziciis 20 grandformatajn pentraĵojn. ĉefe pejzaĝajn. Eĉ se la arto de s-ino Almada impresis amatore, la maniero en kiu la ekspozicio estis aranĝita, eta presita katalogo kaj la prizorgo havis multon de profesinivela gusto. Alia ekspozicio, fotografia, trafe rakontis pri sanprizorgo en Brazilio. Reklamkolono en la akceptejo temis pri la Jaro de Handikapuloj. Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz havis viglan ekspozician standon pri siaj Esperantaj eldonaĵoj.

FAKAJ KAJ ALIAJ KUNVENOJ: Asembleo de Fakaj Asocioj traktis la sciencan aplikadon de Esperanto. Poŝtistoj kaj telekomunikistoj decidis agadi por penetri en la samfakajn internaciajn organizaĵojn. Simile, la medicinistoj klopodos starigi kontaktojn kun Monda Organizo pri Sano kaj Ruĝa Kruco/Lunarko. La fervojistoj ne sukcesis fari utilajn sud-amerikajn kontaktojn sed decidis intensigi sian agadon inter la junularo. Esperanta Ŝak-Ligo Internacia aranĝis sukcesan turniron en Brazilio. La skoltoj diskutis kun Brazila Skolta Asocio kaj starigis fondaĵon por eldono portugallingva de la informa broŝuro *Vastaj horizontoj*. La aŭtomobilistoj planis ralion lige al la venontjara UK. Pliajn landajn sekciojn provos fondi la katolikoj, dum vegetaranoj pledos por pli da atento al iliaj bezonoj en la estontaj kongresurboj. Eŭropa Klubo vokis al partopreno en Internacia Kibernetika Kongreso (aŭgusto 1983), kiu verŝajne uzos Esperanton kiel oficialan lingvon. Kunvenis ankaŭ matematikistoj, filatelistoj, radio-amatoroj, go-ludantoj, bahaanoj, kristanoj (protestantoj), Oomoto, spiritistoj, veteranoj ktp. Okazis apartaj kunsidoj pri diversaj movadaj laborkampoj: esploro kaj dokumentado, delegitoj de

UEA, eksteraj rilatoj, informado, parlamenta agado, kulturo, edukado, sporto, landa agado, financo kaj administrado, planado, Instituto Hodler, Internacia Jaro de Handikapuloj.

GAZETARA SERVO: Kun Giuseppe Grattapaglia kaj Marinko Gjivoje, ĝi funkciis bone, precipe ĝia nacilingva fako, al kiu ŝuldiĝas granda reeĥo ne nur en la gazetaro sed ankaŭ en la radio kaj televido, kiu intervjuis plurajn elstarajn kongresanojn. Loka radio-stacio elsendis ĉiumatene en kaj pri Esperanto. Cetere la brazila internacia radio raportis en Esperanto ĉiutage pri la UK, sed anoncis sian decidon tion fari nur lastmomente — tiel ke aŭskultis verŝajne nur tiuj fakdelegitoj pri radio kaj aliaj aktivuloj, kiujn la Gazetara Servo aerpoŝte atentigis. En Rio, survoje al la Kongreso, pluraj UEA-funkciuloj aperis en televida debato. Tamen, en la gazetara konferenco en Brazilio aŭdiĝis pli da interesaj demandoj ol da trafaj respondoj.

GIĈETOJ: Alia kongreso en la samaj ejoj finiĝis por lasi unu solan nokton al LKK instali la giĉetojn, transporti la materialojn, plenigi dokumentujojn, mebli 18 salonojn ktp. Ĉirkaŭ 300 homoj aliĝis surloke. Du trionoj de la kongresanoj unuafoje estis en Universala Kongreso. Ĉio ĉi devus servi kiel senkulpigo pro la malglata funkciado de la giĉetoj, precipe en la komenco. LKK mem havis nur entuziasmon, ne sperton. Tamen, kelkaj LKK-anoj heroe eltenis la laborstreĉon. Funkciis ankaŭ apartaj standoj de banko, flugkompanio kaj poŝto.

INTERKONA VESPERO: Ĝi donis ŝancon konatiĝi nur kun la kongresa urbo, pere de longa prelego de Newton E. Rossi, prezidanto de la Federacio de Komerco en Brazilio kaj unu el la plej entuziasmaj simpatiantoj de Esperanto inter la ĉefurbaj oficialuloj. Cetere, la vespero proponis nenion el la tradiciaj trajtoj de tiu kongresa programero. Mankis lokoj por sidi, nenia bufedo funkciis, nenia muziko aŭdiĝis. La Estraro de UEA proponis kelkajn manpremojn ĉe la enirejo.

JUNULARAJ ARANĜOJ: Ĝenerale la Kongreso impresis pli junece ol kutime, pro la ĉeesto de multaj brazilaj gejunuloj kaj studentoj. Ili tamen estis pli okupitaj pri la samtempaj kunvenoj de Brazila Esperantista Junulara Organizo, ol pri la kutimaj junularaj programeroj. Junulara vespero en diskoteko pasis en febra ritmo de plurhora sambo. Bela novaĵo — komuna biciklado tra la urbo — ne realiĝis pro lastmomenta teknika problemo. Grupoj da gejunuloj improvizis oftajn koncertojn sur la herbejo ekster la kongresa domo.

KAFO: La plej bela surprizo por multaj kongresanoj estis la stando de la Brazila Instituto pri Kafo. Tie ĉiu, tra la tuta semajno, povis senpage kaj tre rapide ricevi taseto(j)n da fama brazila kafo. Kvankam ni ne havas precizajn informojn, ni supozas ke la kongresanoj tie konsumis almenaŭ centon da kilogramoj da kafo. La danko al la Instituto devus duobliĝi, se oni pensas, ke dum aliaj Universalaj Kongresoj ĉiu kafdeziro kostas

minimumo duonhoron da tempoperdo. Jen granda brazila kontribuo al la efikeco de la Kongreso ĉi-foje!

KLERIGA PROGRAMO: Trihora kurso de José Passini provis enkonduki la interesitojn al la portugala lingvo. Tre populara montriĝis la Progresiga Kurso (4 duhoraj lecionoj), kiun gvidis William Auld. Li verkis specialan kursomaterialon, kiu vendiĝis en kelkcento da ekzempleroj kaj estos poste aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. Funkciis ankaŭ konversaciaj rondoj por nespertaj parolantoj. Je ĉagreno de pluraj sud-amerikanoj, la anoncita Cseh-seminario ne okazis. Anstataŭe, F. Simonnet gvidis interesan diskuton pri la instrumentadoj de Esperanto.

KONGRESA KURIERO: Aperis 9 numeroj, bone redaktitaj de s-ino Akiko Woessink-Nagata. Pro oftaj kaj multaj programŝanĝoj, la gazeto montriĝis aparte utila dum ĉi tiu Kongreso. Ĉu la ĝusta loko de pli ol 300 adresoj de novaj aliĝintoj estis en *Kongresa kuriro* aŭ en dua suplemento al la Kongresa Libro?

LIBROSERVO: Kiel organizanto funkciis la Libroservo de UEA, sed la ĉefan surlokan laboron faris taĉmenteto da aktivuloj de Brazila Esperantista Junulara Organizo. Tre grandan ejon, modeste meblitan, plenigis pluraj miloj da ekzempleroj de preskaŭ 700 diversaj librotitoloj. Ĉefe la sud-amerikaj klientoj preskaŭ batalis por akiri ekzempleron de *Plena analiza gramatiko*, de *Plena ilustrita vortaro* aŭ aliaj gravaj libroj. Kvankam la finkalkulo de la Kongresa Libroservo ankoraŭ ne estas preta, eblas anonci, ke la vendoj superis la antaŭajn jarojn kaj atingis preskaŭ 1 400 000 kruzejojn, kio egalas al ĉ. 40 000 guldenoj. La Libroservo de UEA donis speciale rabatitajn prezojn por ĉi tiu okazo, sed montriĝis, ke ĝi subtaksis la aĉetemon de la sud-amerikanoj. Neniuj libroj reiris al Roterdamo, ĉar la malgrandan reston aĉetis brazilaj E-organizaĵoj. Aparta butikoj vendis kompletan dek bildkartoj kun Esperanta teksto, T-ĉemizojn ktp.

LOĜIGO: Braziliaj hoteloj montriĝis komfortaj sed ne ĉiam moderprezaj. Tuta miraklo estas la fakto, ke preskaŭ duono de la kongresanoj loĝis pli-malpli senpage (kontraŭ 25 usonaj dolaroj por la tuta semajno) en relative komforta komuna loĝejo, kie la gejunuloj kaj studentoj devis pagi absolute nenion. LKK meritas ĉiujn laŭdojn pro tiu atingo, kaj la kongresa urbo ricevu varman dankon. Malfeliĉe, plejmulto de niaj kongresurboj ne havas la grandanimecon de Brazilio.

POŝTMARKO: Speciala poŝtmarko omaĝe al la Kongreso altiris la atendantan atenton. Eleganta en la simpleco de sia desegno, ĝi ripete elstarigis la nomon de la Kongreso kaj havas pli klaran informan valoron ol la plimulto de la antaŭaj filatelaj samtemaj. Kompreneble, la Kongreso havis ankaŭ specialan poŝtan stampon. Malpli kompreneble estis, ke por havigi ambaŭ aferojn al siaj bildkartoj, la kongresanoj devis dufoje enviciĝi, unue por aĉeti la poŝtmarkon kaj due — sur alia etaĝo — por ĝin stampigi. UEA aĉetis kvanton da filatelaj kompletoj, kiuj vendiĝos tra la Libroservo. Vi legos anoncon pri tio en nia oktobra numero.

37a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO:

Ĉu TEJO ekzistas ekster Eŭropo?

Kiam oni aranĝas laŭvice la 37an internacian kongreson, devus ekzisti (kaj ekzistas) maniero transdoni la spertojn. En Meksikio oni komplete ignoris tiun regulon. Oni ĉion volis mem fari. Tiel la 37a IJK fariĝis multekosta sukceso kaj tre valora leciono por la estontaj organizantoj.

”AJ, AJ, aj, aj! Kantu kaj ne ploru!” Jen parto de la rekantaĵo esperantlingva de unu el la furoraj kantoj de la 37a Internacia Junulara Kongreso, okazinta inter la 10a kaj 17a de julio ĉi-jare en la feria centro Oaxtepec, Meksikio, kun la ĉeftemo ”Infano kaj Esperanto”. Cetere, tiuj samaj vortoj povus esti bona konsilo ankaŭ por eventualaj kritikantoj de la Kongreso: oni devus ne nur preparoli la mankojn kaj erarojn de tia ĉi kongreso, sed ankaŭ prikanti ĝiajn sukcesojn kaj atingojn. Tamen, eraroj kaj malglataĵoj estas menciindaj, ĉar spertoj akiritaj helpas al pli bona organizo de estontaj renkontiĝoj kaj kongresoj.

Nedisputeble estas, ke kelkaj aspektoj de la Kongreso ne iris glate, kaj tio povis plorigi eĉ la plej tolereman kongresanon. Por eŭropaj kongresanoj, al kutimiĝintaj al (pli-malpli) akurate funkcia kongresprogramo, estis malfacile akcepti la meksikian kutimon de malfruiĝo, kiu influis multajn kongresajn aranĝojn. La vorto ”mañana” (ĉi tie signifanta ”baldaŭ”) minacis establiĝi en Esperanto-vortaroj kiel plenrajta vorto, pro sia ofteco dum la kongresa semajno. Prokrastiĝis, ekzemple, kaj la inaŭguro kaj la fermo de la Kongreso, ankaŭ la fintaga ekskurso, kio rezultigis malfruan alvenon en Meksikurbo por pluraj pluveturontoj. Simile priploreblaj estis la neokazo de la tradicia interkona vespero kaj la neapero (eĉ ne ĝis la fino de la kongresa semajno) de la Kongresa Libro. Nekutima kaj iom ĝena fenomeno por multaj kongresanoj estis la neceso dependi (tra dolorigaj kapaŭskultiloj) de samtempa tradukado, ĉar pluraj prelegoj estis prezentitaj en la hispana lingvo. Tio ĉi tamen parte ŝuldiĝis al la fakto, ke kelkaj prelegantoj esperantistaj, invitatitaj de la LKK, aŭ malfrue aŭ tute ne komunikis, ke ili ne povas ĉeesti la Kongreson. Pro tio estis necese trovi aliajn prelegantojn, kaj la LKK sukcesis venigi al Oaxtepec diversajn renomajn fakulojn, kiuj prezentis altnivelajn prelegojn — bedaŭrinde ofte super la nivelo de la aŭskultantaro kaj foje ankaŭ preter la tradukkapablo de la neprofesiaj interpretistoj.

Malgraŭ ĉio ĉi, endas prikanti la atingojn kaj meritojn de tiu ĉi Kongreso. Post iom klikeca divido komence

de la semajno, la kontaktoj kaj amikecoj inter kvardeko da pli-malpli "veteranaj" kongresanoj el Eŭropo, Israelo kaj Norda Ameriko kaj cento da meksikaj "novuloj" iom post iom establiĝis dum la semajno. Pri manko de la kongreslibro oni elturniĝis per multobligitaj program- kaj inform-folioj, kaj fine kompleta adresaro. Sed eble la plej grava afero, almenaŭ por la pretendata tutmondeco de la organizaĵo, estas la fakto, ke TEJO finfine refoje kongresis ekster la tradicia eŭropa lulilo de la Movado, dek kvin jarojn post la unua ekstereŭropa kongreso en Ocu (Japanio). Simile menciindas, ke tiu ĉi estis la unua TEJO-kongreso okazinta en Latin-Ameriko, atingo kiu spegulas la lastatempan kaj daŭrantan aktivecon de la esperantista junularo en tiu ĉi mondparto. Ambaŭ tiuj ĉi atingoj grandparte ŝuldiĝas al la ŝajne senlaca laborado de unu familio, kiu provizis ne nur LKK-prezidanton, sed ankaŭ sekretarion kaj prizorgantojn de programo, eldonaĵoj, kaj specialaj aranĝoj. Temas pri la familio Nájera, kiu multe aktivas ankaŭ en la memstara landa sekcio de TEJO, Esperanta Meksika Junularo (EMJ).

Alia sukceso, pri kiu oni informis ĉe la Kongreso, estas la utiligo de Esperanto en la komerca komunikado fare de granda meksikia investokompanio. Tiu ĉi atingo fontas el klopodoj de EMJ, kunlabore kun konsultisto de la kompanio Martin Winant, kaj signifas plian paŝon al ĝenerala utiligado de la Internacia Lingvo sur nemovadaj kampoj.

Sukcesaj estis grandparte ankaŭ la distraj programeroj, kvankam ankaŭ ili emis prokrastiĝi. La ekskurso portis

nin al la aztekaj piramidoj ĉe Teotiŭakan, kie oni povis vidi, ke longe antaŭ la alveno de la hispanaj konkerantoj, jam ekzistis alte evoluinta civilizo en Meksikio.

Ankaŭ la Komitato de TEJO kunsidis dum la kongresa semajno, kaj, kvankam senkvoruma, tralaboris sufiĉe abundan tagordon, ero de kiu estis ankaŭ novelekto de la Estraro. Ĉiuj decidoj de ĉi tiuj komitatkunsidoj estos poŝte voĉdonitaj de la tuta Komitato. Tio inkluzivas la konsiston de la nova Estraro, por kiu estas proponitaj: Amri Wandel (Israelo), Csaba Lendvay (Hungario), Thomas Bormann (FR Germanio), Yves Bellefeuille (Kanado), Ian Jackson (Britio), Michael Lennartz (Germana DR), András Lukács (Hungario) kaj Ian Tarrant (Britio). Menciindas ankaŭ la renovigo de kontrakto pri kunlaboro inter TEJO kaj Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK).

Resume, do, la Kongreso estis relative sukcesa, eĉ malgraŭ ne malmultaj malglataĵoj. Al la demando starigita en diskuto "Ĉu TEJO ekster Eŭropo?" oni povas respondi jese, almenaŭ pri Meksikio.

Robert Haddon

Plia paŝo al tutmonda TEJO

LA ĈI-JARA Internacia Junulara Kongreso estis escepta el multaj vidpunktoj. Estis la unua fojo, ke TEJO kongresas en Ameriko. Aranĝis la kongreson Landa Sekcio kiu ĝis nun apenaŭ estis konata en la Movado. La kongresa temo estis "la infano kaj Esperanto", sed la "movada" temo efektive estis "Ĉu TEJO ekzistas ekster Eŭropo?" — demando kiu estis serioze kaj sincere traktita en publika debato dum TEJO-vespero, unu el la plej sukcesaj kiujn mi memoras.

Multoblan respondon al tiu demando provizis la Kongreso mem. Unue, kvankam ĝi estis for de Eŭropo, la 108 partoprenantoj el 19 landoj kaj la kutima internacia etoso pruvis, ke eĉ la oceano ne estas barilo sufiĉe alta por ke niaj gejunuloj rezignu viziti la Internacian Junularan Kongreson. Due, montriĝis ke la meksikaj gejunuloj kaj la gastoj el trans la oceano tute harmonie interrilatis, kunlaboris kaj distriĝis.

Plej valora estis la aktiva partopreno de la meksikaj esperantistoj en la publika debato pri varbado kaj informado pri Esperanto ekster Eŭropo. Trie, kiel emfazas la rezolucio de la kongreso, la sukcesa okazigo de la IJK en Meksikio estis plia paŝo al internacia TEJO, sekvanta la vigliĝon en la rilatoj inter TEJO kaj la japana kaj korea Esperanto-movadoj, kaj sekvota — espereble — de simila vigliĝo en Latina Ameriko, post la Universala Kongreso en Brazilo.

Simbola en tiu rilato estas la granda Esperanto-flago, kiun la LKK donacis al TEJO, kaj dum la ferma ceremonio transdonis al la reprezentanto de la venontjara IJK. Ni esperu, ke la landoj de la estontaj kongresoj, brodotaj sur la flagon, konsistigos tutmondan mozaikon!

Amri Wandel



Kongreseroj...

Bonvolu malforstreki!

Ĉiuj artaj aranĝoj, Solena Inaŭguro, Malfermo, Ĝeneralaj Kunsidoj kaj eĉ la Solena Fermo en Brazilio finiĝis per anoncoj, kiuj plej ofte temis pri la programŝanĝoj. Ĉar plurfoje temis pri reŝanĝoj, necesis ankaŭ lingve elturniĝi. Ni notis du esprimojn, kiujn uzis la ĝenerala direktoro de UEA: "Bonvolu malforstreki...", "Estis miskompreno, ke estis miskompreno". Malica kongresano rimarkigis, ke en Brazilio ĉiuj artaj programoj komenciĝis per unuhora paŭzo.

Kunportu vian propran seĝon!

La kongresejo de la 66a UK havis nur 400 seĝojn por 18 malpli grandaj salonoj en kiuj okazis ĉiuj fakaj kaj neĝeneralaj kunsidoj. Strange, ke oni tiel administras tiun belan konstruaĵon, des pli ke oni ofte disponigas ĝin senpage al diversaj kongresoj. Ĉiukaze, se ni denove kongresos en la sama loko, ni konsilas, ke vi prefere kunportu vian propran seĝon!

Ĉu Charles edziĝis?

La tuta Estraro de UEA ekmutis, kiam iu anoncis, ke "Charles edziĝos ĉi-semajne al iu anglino." La Estraro tuj pensis pri la kongresa administranto Charles Power. Iu tuj aldonis, ke la antaŭan tagon Power prenis de la kongresa kaso 700 000 kruzejrojn (20 000 gld.), kio supozeble sufiĉus por la edziĝfesto. Rapide montriĝis, ke la monpreno rilatis la pagon de diversaj kongresaj fakturoj kaj la edziĝo koncernis la britan princon Charles, kiu malfraŭliĝis tiusemajne.

Internacia Arta Nokto

Kiam Renato Corsetti malfermis frumatenan kunsidon, li diris "Vi, kiuj hieraŭ ĉeestis la Internacian Artan Nokton..." Li celis la Internacian Artan Vesperon, kiu kun paŭzoj daŭris pli ol kvar horojn kaj finiĝis post la noktomezo. Oni povus simile paroli pri "Brazila Nokto" kaj "Varia Nokto", ĉar ankaŭ tiuj artaj programoj havis ekscesan longecon.

Parlamenta soifo

Komence de ĉi tiu revunumero ni elstarigis la belecon de la parlamenta konstruaĵo, kiu gastigis la Inaŭguron

de la 66a UK. Tiu arkitektura ĉefverko ornamas ankaŭ nian kovrilon. Tamen, neniu antaŭvidis, ke kelkaj el la 1800 kongresanoj kaj gastoj povus en tiu dimanĉa mateno bezoni akvon aŭ uzi necesejon. Pro maleblo trovi la dommastron de la konstruaĵo, la sola akvo, kiu rolis en la Inaŭguro, estis la ŝvito de la kongresanoj.



Kial brilo en tiaj kvantoj en la okuloj de d-ro Victor Sadler? Ĉu pro financa rezulto de la Kongreso? Ĉu pro bona evoluo de la flugvojaĝoj, kiujn ĉefe li organizis nome de UEA? Alia kialo?! Nu, jen la stelohava homo.

Vestaĵoj kaj kantistoj

William Auld, kiu gvidis la programon de Internacia Arta Vespero, anoncis ke oni ŝtelis la vestaĵojn de unu el la kantistinoj de la pola dueto "Konsonanco", kio ja kreis

teknikajn problemojn por la sceneja prezentiĝo. Kiam la kantistinoj aperis, apuda spektanto — supozeble, naturisto aŭ nudisto — komentis: "Bedaŭrinde, ne ĉiujn!"

Akademia korekto


Respondilo pri la planita nepublika kunsido de la Akademio revenis al la Kongresa Gazetara Servo kun la indiko "La kunveno ne okazis." La prezidanto de la Akademio utiligis la okazon por lingve korekti la respondilon, kiu enhavis la jenan eron: "okazis kunvenon/kunsidon en salono..."

Solena akcidento

Komitatanino Ewa Kuligowska bele aranĝis sian frizuron, surmetis balrobon kun la konvenaj ornamaĵoj, atente ŝminkis sin kaj ekiris al la Balo. Tuj poste, ekster la hotelo, ŝi elartikigis maleolon kaj devis resti en sia lito. Oni ja ne devas ŝminki sin kaj solene vestiĝi por akcidenti.

Kantĥoro "Nájera"

La 37an TEJO-Kongreson en Meksikio komplete kaj preskaŭ sole prizorgis la entreprenema familio Nájera. La multnombra familio, helpe de iom da bofamilianoj, konsistigis eĉ la koruson, kiu kantis al la kongresanoj en Oaxtepec. Nu, ĉu ni nun havas ankaŭ en la Movado unu el tiuj ĉiopovaj "juntoj", kiuj regas plurajn landojn de Latin-Ameriko?



Provo organizi tiun prave forgesitan kongresan eron, kiu nomiĝis "komuna fotografado", malsukcesis. Tamen, jen la homoj descendas el la parlamentejo, kvazaŭ ili venus el la ĉielo mem. Bela spektaklo sen spertaj fotoĝoj.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem.

Ŝparu ĉe UEA! Via mono povas doni al vi renton de 6 procentoj en guldenoj. Samtempe vi helpas la Asocion. Petu la regularon ĉe la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio.

Reto Rossetti informas geamikojn pri sia nova, jam definitiva adreso: Shadows, Wainlode Lane, Norton, Gloucester, GL2 9LN Anglio.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordal-bingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtgirkonto Hamburg 150 58-209.

Leteresperon organizas en decembro Esperanto-Societo (Malta) okaze de la 20a datreveno de sia fondiĝo. Salutleteroj, bildkartoj el la tuta mondo bonvenaj. Respondo garantiita. Skribu al: S-ro J. Vella-Bondin, Sekretario, "La Espero", New Street off Qormi Road, St. Venera, Malto.

La Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj (Mormona), pritraktas la proponon akcepti Esperanton. Helpu al ili decidi! Skribu amase al: LDS Church, Missionary Department, 50 East North Temple, Salt Lake City, Utah 84150, Usono.

Tutmonda esperantista adresaro 1981 aperis (eldonejo: Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio). ĉ. 2700 adresoj el ĉ. 60 ŝtatoj, kun indikoj pri aĝo, profesio, grado de E-sciado, deziro korespondi, preteco gastigi. Tuj mendu ĝin ĉe vialanda libroservo!

LA VIRO EN LA MORTOTUKO, de episkopo Sven Danell, traktas la novajn sciencajn faktojn pri la mortotuko en Torino. SKr. 25,—

Gramofondisko: Kantoj de Margit Håkansson-Fridell. SKr. 12,—


Kasetoj: predikoj kaj kantoj, antaŭe elsenditaj per IBRA-radio. SKr. 15,—

Je antaŭpago afrankite.

FÖRLAG GRÖNA STJÄRNAN
Landerigat. 7, S-416 70 Göteborg, Svedio
Poŝtĉekkonto 8 84 51-0

Plena analiza gramatiko de Esperanto kompletigas la kvaropon

Kiam en 1970 aperis *Plena ilustrita vortaro* (135,60 gld.), ĝi estis la sola baza verko havebla en la movada libromarketo. En 1974 aldoniĝis al ĝi *Esperanto en perspektivo* (84,00 gld.). Antaŭ du jaroj, Hungara Esperanto-Asocio reprenis la malnovan *Enciklopedio de Esperanto* (45,00 gld.), kaj — fine — per la eldono de *Plena analiza gramatiko de Esperanto* UEA kompletigas tiun eminentan kvaropon de la bazaj kaj elĉerpaj konsultolibroj pri (pli-malpli) ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado.



Se la vendoritmo de *Plena analiza gramatiko* konserviĝos ankoraŭ por ioma tempo, tiu lasta aliĝinto al la kvaropo estos ankaŭ la unua kiu ekmankos denove, ĉar en iom pli ol duona jaro de post la apero, duono de la eldonkvanto de 3000 ekzempleroj jam estas for. Indas do rapidi!


Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901-). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1980 (4a tralaborita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0. Prezo: 48,00 (por Nederlando 49,92) gld., plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3-ekzemplera mendo.



Alberta Casey vokas al San Diego

GRAMOFONDISKO "SAN DIEGO VOKAS"

Post la sukceso de
sia unua disko
"Al vi de mi" (kiu
baldaŭ elĉerpiĝos)
Alberta Casey nun
venas kun nova
grandformata
disko, kun 13 tre
konataj kantoj.
Prezo: 36,00 gld.
Mendu ĉe UEA!



Kiom el niaj revuoj aperigis la septembran
numeron jam en julio? Almenaŭ unu:

Fonto

kiu per sia unua jarkolekto (oktobro
1980 – septembro 1981) firme establiĝis
kiel la beletra revuo de la okdekaj jaroj.

Redaktoro: William Auld. Aperas ĉiumo-
nate: 12 ilustritaj kajeroj, po 44p., jare.

Enhavo de la unua jarkolekto: 40 originalaj
noveloj, 29 tradukitaj noveloj (el 9 lingvoj), 108
originalaj poemoj, 143 tradukitaj poemoj (el 25
lingvoj), 2 teatraĵetoj kaj 3 longaj recenzoj.

Ankoraŭ haveblas la unua jarkolekto kontraŭ
35,00 gld. Abonojn por la 2a jarkolekto akcep-
tas la Libroservo de UEA. Prezo: 39,00 gld.
(plus 4%, nur por nederlandaj klientoj).

Fonto

Eldonisto:
Gersi Alfredo Bays
Caixa Postal 49
BR-89800 Chapecó (SC)
Brazilo

"Per MONATO mi revenis al Esperanto." — Jen
unu respondo al la ofta embarasa demando, kiel
ligi homojn al Esperanto. Homoj, kiuj lernis la
lingvon kaj simpatias al ĝi, sed ne volas aŭ ne
povas movadumi. En MONATO ili trovas tion,
kion ili serĉas: praktikan utilon por Esperanto,
personan, fakan, profesian. Se ankaŭ vi ekkonas
ĉi tiun grandegan propagandan valoron de
MONATO, varbu por MONATO kaj tiel per
MONATO por Esperanto.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj
jare. Jarabono 49,50 gmk aŭ 800,- bfr. La abonon
bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto
p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat,
Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA
(52,50 gld.; por Nederlando 54,60 gld.). Petu
provekzempleron kontraŭ du int. respondkupo-
noj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur
unufoje fari tian peton.)

"Ĉi tiu portreto de
Zamenhof estas tiel
bela kaj tiel majstre
teksita, ke mi kre-
das neniam antaŭe
esti vidinta pli rav-
an bildon de la
aŭtoro de Esperan-
to." Tiel diras unu
el la multaj ĝisnu-
naj aĉetintoj de la
silka portreto de
d-ro Zamenhof.



La plej bela portreto de Zamenhof

SILKA PORTRETO DE D-RO ZAMENHOF:
Tre delikate teksita per blanka kaj nigra silkaj fadenoj.
Kun aŭtografo. Borderita. Facile enkadrigbla aŭ alima-
niere pendigebla. Formato: 28x42cm. Eldonis: Ĉina
Esperanto-Ligo, 1980. Prezo ĉe la Libroservo de UEA:
9,00 gld. (Triona rabato por la aĉeto de tri ekzempleroj)